KLUBO	<i>CLUB</i>	SENTI	<i>SENTIR</i>
LIGNO	<i>MADERA, LEÑA</i>	TONDI	<i>CORTAR CON TIJERA</i>
MANO	<i>MANO</i>	TRANĈI	<i>CORTAR</i>
PANO	<i>PAN</i>	TROVI	<i>ENCONTRAR</i>
PARKO	<i>PARQUE</i>	VENDI	<i>VENDER</i>
PORKO	<i>CERDO, PUERCO</i>	VIZITI	<i>VISITAR</i>
RAZEJO	<i>PELUQUERÍA</i>		
REVUO	<i>REVISTA</i>		
TAGO	<i>DÍA</i>		

La tagoj de la semajno

LUNDO	<i>LUNES</i>	HODIAŬ	<i>HOY</i>
MARDO	<i>MARTES</i>	HIERAŬ	<i>AYER</i>
MERKREDO	<i>MIÉRCOLES</i>	MORGAŬ	<i>MAÑANA</i>
ĴAŬDO	<i>JUEVES</i>		
VENDREDO	<i>VIERNES</i>		
SABATO	<i>SÁBADO</i>	KVAR	<i>CUATRO</i>
DIMANĈO	<i>DOMINGO</i>	KVIN	<i>CINCO</i>

LA INSTRUISTO PAROLAS

-EJ es un sufijo que indica *lugar destinado a algo*, o *apropiado para algo*: **lerni** – *aprender*, **lernejo** – *escuela*; **laborejo** – *lugar de trabajo, taller*; **lavejo** – *lavadero*; **kafejo** – *un café*; **pordo** – *puerta*, **pordisto** – *portero*, **pordistejo** – *portería*.

-IL, sufijo que indica *instrumento, aparato, utensilio* (recuerde *utens-il-io*): **tranĉi** – *cortar*, **tranĉilo** – *cuchillo*; **kombi** – *peinar*, **kombilo** – *peine*.

-IS, -OS, son las terminaciones del *pasado* y *futuro* respectivamente, de todos los verbos.

mi faris, *yo hice* – **mi faros**, *yo haré*.

mi faris, *tú hiciste* – **vi faros**, *tú harás*.

ni faris, *nosotros hicimos* – **ni faros**, *nosotros haremos*.

Unu, du, tri, kvar, kvin. La combinación **kv** – **kvar, kvin**, es la versión eslava de la forma latina “qv”.

VERBOS TRANSITIVOS E INTRANSITIVOS. Si aplicando el método visto en la lección anterior analizamos la frase “*Juan duerme en la cama*”, y preguntamos: *¿Quién duerme?*, obtendremos el sujeto: “*Juan*”. Pero si continuamos aplicando nuestro método y preguntamos: “*qué es lo que Juan duerme*” no hallaremos contestación lógica, y es que la acción de dormir no pasa de Juan; él mismo es el principio y fin de la acción expresada en el verbo. Se dice entonces que estos verbos son *intransitivos*, y no irán seguidos de complemento directo.

Son también verbos intransitivos –o neutros– **esti, morti, vivi, ekzisti, resti** – *ser, estar, morir, vivir, existir, permanecer*, y otros que denotan estado o actividad que no sale del sujeto.

7-a LECIONO

Kiel vi fartas, amiko?

Mi fartas bone, **dankon**, kaj vi?

Mi estas sana, sed mia frato ne fartas bone, li havas gripon.

Ĉu li estas **grave** malsana?

Ne, sinjoro, lia malsano ne estas grava.

Jen du veturiloj: unu moderna kaj alia malmoderna; **aeroplano** kaj **ĉaro**.



Kia estas la aeroplano?


Moderna, **rapida**, **komforta**.

Kia estas la ĉaro?

Kio **movas** la aeroplanon?

La motoroj.

Kio movas la ĉaron? La bovoj.



Kiel flugas la aeroplano? Rapide, tre rapide.

Kiel iras la bovĉaro?

Ĉu la modernaj homoj veturas per bovĉaro?

Ĉu vi veturas per aeroplano?

Kiel kantas la kanario? – Bele.

Kiel vi kantas? Kiel vi lernas?

La bela birdo flugas rapide.

Kia estas la birdo? Kiel ĝi flugas?

La rapida birdo flugas bele?

Kia estas la birdo? Kiel ĝi flugas?

Petro diras al Maria: “Vi estas bela kiel floro. Viaj kisoj estas dolĉaj kiel mielo. Sed via patro estas forta kiel bovo”.

Kie loĝas Karlo?

Li loĝas **proksime** de la parko.

Ĉu vi **ofte** vizitas lin?

Jes, mi vizitis lin antaŭhieraŭ, hieraŭ, hodiaŭ kaj ankaŭ mi vizitos lin morgaŭ, postmorgaŭ... Mi vizitas lin **ĉiutage**.

Ĉu vi aĉetas ĉiutage ĵurnalon?

Ĉu vi razas vin ĉiutage? Ĉu vi lavas vin ĉiutage?

Mi havas lernolibron, vi ankaŭ havas lernolibron, kaj li, kaj ŝi ankaŭ havas lernolibron. **Ĉiu** lernanto havas unu lernolibron; sur ĉiu seĝo sidas unu lernanto.



Jen estas seĝo.

—Ĉu **iu** sidas sur tiu seĝo?

—Ne, sinjoro, **neniu** sidas sur tiu seĝo.

Ĉu iu lernanto staras? Ne, ĉiuj lernantoj sidas.

Ĉu iu ne komprenas? Ne, sinjoro, ni ĉiuj komprenas.



Jen **skatolo**.

—Ĉu la skatolo estas **plena**?

—Ĉu estas **io** en la skatolo?

—Ne, la skatolo estas malplena; en la skatolo estas **nenio**.

–Kie estas la libroj, **kajeroj** kaj plumoj?

–**Ĉio** estas sur la tablo.

En la hejmo Maria faras **ĉion**, sed Ana faras nenion.

Dialogo kun infano.

–Kion vi faras, Roberto.

–Nenion.

Kaj vi, Karlo?

Mi **helpas** Roberton.

–Ĉu vi bone kalkulas? Ĉu vi povas kalkuli la fingrojn de viaj du manoj?

–Jes, mi povas kalkuli: unu, du, tri, kvar, kvin...

–Mi helpos vin: ses, sep, ok, naŭ, dek.

–Tre bone. En la du manoj estas dek fingroj.

–Kiel respondas la bona lernanto?

La bona lernanto respondas forte, kuraĝe kaj elegante.

VOCABULARIO

BOVO	<i>BUEY</i>	FARTI	<i>ESTAR DE SALUD</i>
ĈARO	<i>CARRO</i>	HAVI	<i>TENER, POSEER</i>
GRIPO	<i>GRIPE</i>	HELPI	<i>AYUDAR</i>
KAJERO	<i>CUADERNO</i>		
MIELO	<i>MIEL</i>	OFTE	<i>FRECUENTE- MENTE</i>
SKATOLO	<i>CAJA</i>		
		KIEL	<i>CÓMO, DE QUE MODO</i>
GRAVA	<i>IMPORTANTE, GRAVE</i>	IO	<i>ALGO,</i>
KURAĜA	<i>VALIENTE</i>		<i>ALGUNA COSA</i>
KOMFORTA	<i>CONFORTABLE</i>	IU	<i>ALGUIEN, ALGUNO-A</i>
LASTA	<i>ÚLTIMO</i>		
PLENA	<i>LLENO, COMPLETO</i>	ĈIO	<i>TODO</i>
PROKSIMA	<i>PRÓXIMO</i>	ĈIU	<i>CADA (UNO-A)</i>
RAPIDA	<i>RÁPIDO</i>	NENIO	<i>NADA</i>

NENIU	<i>NADIE, NINGUNO-A</i>
JEN	<i>HE AQUÍ</i>
ALIA	<i>OTRO, OTRA</i>
TRI	3
KVAR	4

KVIN	5
SES	6
SEP	7
OK	8
NAŬ	9
DEK	10

LA INSTRUISTO PAROLAS

ADVERBIO. Antes de ir a escuchar a un cantante, deberíamos saber como ese cantante canta. La palabra que habrá de decidirmos es un adverbio: bien, mal, regular. En Esperanto el adverbio termina en **-e**, que corresponde al final *-ente*, en que terminan muchos adverbios castellanos: **rapide** – *rápidamente*, **facile** – *fácilmente*, etc.

La bona sinjorino kantas bele.

La buena señora kanta bellamente.

La bona sinjorino kantas bone.

La buena señora canta bien.

El adverbio contesta a una de estas tres preguntas: *¿Cómo?* *¿Cuándo?* *¿Dónde?*, es decir, que hay *adverbios de modo* (bien), *de tiempo* (ayer), y *de lugar* (aquí).

KIEL VI FARTAS? – *¿Cómo se encuentra Ud. de salud?* Estas preguntas, como todas las que comiencen con **kiel**, exigen un adverbio como respuesta: **bone**, **nebone**, **malbone** – *bien, regular, mal*.

Hay en Esperanto algunos adverbios simples, no derivados, que no llevan la terminación **-e**: **hieraŭ**, **morgaŭ**...

KIO, KIU, KIE, IO, IU. Seguramente habrá Ud. observado que muchas de esas palabritas tan útiles, como **kio**, **kiu**, **kie**, **ie**, **io** tienen un marcado aire de familia. Y, en efecto, todas estas palabras y algunos miembros más, forman la importante e imprescindible familia de las palabras correlativas. Esta familia, además, se caracteriza por su armonía; obsérvela formando cuadro:

	Indefinidos	Interrogativos y relativos	Demostrativos	Colectivos	Negativos
Individuo	iu	kiu	tiu	ĉiu	neniu
Cosa	io	kio	tio	ĉio	nenio
Lugar	ie	kie	tie	ĉie	nenie
Cualidad	ia	kia	tia	ĉia	nenia

De modo que si **iu** significa *individuo indefinido, alguien, alguno*, **kiu** será *quién, cual*; **tiu**, *esa, ese, aquel, aquella*; **ĉiu**, *cada, todo, (ĉiuj, todos, todas)*; **neniu**, *nadie, ninguno, ninguna*.

La serie **ia** la constituyen adjetivos que concuerdan en número y en caso con el sustantivo:

MI MANGĜAS ĈIAN FRUKTON – *Yo como toda clase de frutas.*

La serie **ie** son *adverbios de lugar*, y con **-n** final indican *dirección*.

Kie vi estas? – *¿Dónde está usted?*

Kien vi iras? – *¿Adónde va usted?*

La serie **iu** indica *individuo o cosa individualizada*. Son pronombres y por lo tanto admiten la “**j**” del plural y la “**n**” del acusativo.

Tiuj, kiujn vi vidas, estas miaj amikoj.

Esos, que Ud. ve, son mis amigos.

También son pronombres los de la serie **io**, *cosa, el objeto (como un todo)*. No llevarán, por consiguiente, la **j** del plural, pero si podrán llevar la **n** del acusativo.

Tio, kion vi bezonas estas en la skatolo.

Lo (eso) que (lo cual) Ud. necesita está en la caja.

VETURILO es *un vehículo*. **Aeroplano, ŝipo, ĉaro, biciklo, estas veturiloj. Mi veturis per aŭtobuso kun mia amiko. Veturilo = ilo por veturi.**

ESTAS NENIO. En castellano se suelen usar dos negaciones con el mismo fin: *no hay nada, no vino nadie, no está en ningún lado*. Lógicamente una negación debiera anular a la otra. En Esperanto la lógica queda restablecida: en una oración irá sólo una negación: **estas nenio** – *no hay nada*, **neniu venis** – *no vino nadie*; **ĝi** (**li, ŝi**, etc.) **estas nenie** – *no está en ningún lado*; **mi havas nenion** – *no tengo nada*.

8-a LECIONO

–Vi **jam scias** kalkuli la fingrojn de viaj du manoj.

–Ĉu vi povas **nun** kalkuli la fingrojn de la du manoj kaj de la du **piedoj**?

–**Mi ne scias**... Ĉu vi povas helpi min?

–Jes, amiko: dek unu, dek du, dek tri, dek kvar, dek kvin, dek ses, dek sep, dek ok, dek naŭ, dudek.

–**Kiom da** fingroj vi havas?

–Mi havas dudek fingrojn.

–Kiom da lernantoj estas en la klaso?

–En la klaso estas dudek unu (21) lernantoj.

22	dudek du	80	okdek
23	dudek tri	90	naŭdek
29	dudeknaŭ	100	cent
30	tridek	101	cent unu
40	kvardek	199	cent naŭdek naŭ
50	kvindek	200	ducent
60	sesdek	1.000	mil
70	sepdek	1.000.000	miliono

Kaj nun ĉu vi povas kalkuli de unu ĝis miliono?

Ni vivas en la jaro dumil kvin 2005.

Kiom da haroj vi havas sur la kapo?

Ĉu vi povas kalkuli ilin?

Kiom da pordoj, fenestroj, muroj estas en la ĉambro?

Ĉu vi povas lerni Esperanton en unu tago?
Sep tagoj faras unu semajnon.
En unu monato estas kvar semajnoj.
Dek du monatoj faras unu jaron.
En la jaro estas tricent sesdek kvin (365) tagoj.
Ĉu vi parolos en Esperanto post tri monatoj? Ĉu vi parolis Esperante antaŭ du monatoj?

Lundo estas la unua (1-a) tago de la semajno; mardo estas la dua (2-a), merkredo estas a tria (3-a), ĵaŭdo estas la kvara (4-a), vendredo estas la kvina (5-a), sabato estas la sesa (6-a) kaj dimanĉo estas la **lasta** tago de la semajno.

Ni lernas la okan (8-an) lecionon.

Kiom da tagoj estas en unu semajno, en unu monato, en unu jaro?

Kiom da horoj estas en unu tago? Kiom da monatoj estas en unu jaro?

–Kiom da dentoj vi havas en la buŝo?


–Mi ne havas dentojn en la buŝo.

–Kie estas viaj dentoj?

–**Ĉe** la dentisto.

ĈU VI **KONAS** MIN? Mi estas tre grava aparato. Mi estas la **mastro** de la moderna homo.

Mi ordonas: laboru, manĝu, iru, venu, dormu, kaj la homo **obeas**. Mi estas la **horloĝo**. Ĉiuj rigardas min. Ĉiuj **aŭskultas** min. Tre ofte en la tago **oni aŭdas** la demandon:



KIOMA HORO ESTAS?

Estas la deka
horo



Estas la deka kaj
tridek.

Estas la deka
horo kaj dek kvin
minutoj.



Estas la deka kaj
kvardek kvin.

Estas dek kvin
antaŭ la dek unua.

Ĉu vi havas horloĝon? Ĉu vi ofte rigardas ĝin? Kioma horo estas en via horloĝo?

La horloĝo havas **montrilojn** (ilojn por **montri** la horon). Estas unu longa montrilo por montri la minutojn, kaj unu mal-longa por montri la horojn.

Kelkaj horloĝoj ankaŭ havas montrilon por montri la sekundojn.

Estas diversaj horloĝoj. Poŝhorloĝoj estas horloĝoj por la poŝo. Murhorloĝo estas horloĝo, kiu pendas sur la muro. Ĉe la **brako** oni **portas** brakhorloĝon.

La koro de la horloĝo batas: tik, tak, tik, tak... la tempo **flugas**. Kaj miaj amikoj demandas:

KIOM AĜA VI ESTAS?



Mi estas tre juna; mi estas unujara.

Mi nur trinkas la patrinan lakton.

Mi estas grandaĝa (multjara) homo; mi estas naŭdekjara.

Mi trinkas nur bovinan lakton.

Kiom aĝa vi estas? Kiom aĝa estas via patro? Kiom aĝa estas la elefanto de la zoologia parko? Ĉu vi ofte respondas "mi ne scias"?

Jen bona konsilo:

Kalkulu en Esperanto. Kalkulu la domojn, la pordojn, la fenestrojn, la arbojn, la librojn. Praktiko kaj ripeto, jen la sekreto.

VOCABULARIO

AĜO	<i>EDAD</i>	BATI	<i>BATIR, GOLPEAR</i>
APARATO	<i>APARATO</i>	DEMANDI	<i>PREGUNTAR</i>
BRAKO	<i>BRAZO</i>	KONI	<i>CONOCER</i>
BUŜO	<i>BOCA</i>	MONTRI	<i>MOSTRAR</i>
DENTO	<i>DIENTE</i>	OBEI	<i>OBEDECER</i>
HORLOĜO	<i>RELOJ</i>	PORTI	<i>LLEVAR</i>
HORO	<i>HORA</i>	SCII	<i>SABER</i>
JARO	<i>AÑO</i>	VENI	<i>VENIR</i>
KAPO	<i>CABEZA</i>	KIOM	<i>CUÁNTO</i>
KLASO	<i>CLASE</i>	NUR	<i>SOLAMENTE</i>
LAKTO	<i>LECHE</i>	JAM	<i>YA</i>
MASTRO	<i>AMO, PATRÓN</i>	DEK UNU	<i>11</i>
MINUTO	<i>MINUTO</i>	DEK DU	<i>12</i>
MURO	<i>MURO, PARED</i>	DEK TRI	<i>13</i>
MONATO	<i>MES</i>	DEK KVAR	<i>14</i>
PIEDO	<i>PIE</i>	DEK KVIN	<i>15</i>
SEKUNDO	<i>SEGUNDO</i>	DEK SES	<i>16</i>
SEMAJNO	<i>SEMANA</i>	DEK UNU	<i>17</i>
TEMPO	<i>TIEMPO</i>	DEK DU	<i>18</i>
DIVERSA	<i>DIVERSO</i>	DEK TRI	<i>19</i>
AŬDI	<i>OÍR</i>	DEK KVAR	<i>20</i>
AŬSKULTI	<i>ESCUCHAR</i>	DEK KVIN	<i>21</i>

LA INSTRUISTO PAROLAS

DA traduce a *de* después de una expresión de cantidad o medida: **kilogramo da pano** – *un kilo de pan*; **10 litroj da vino** – *10 litros de vino*. **Li trinkas tason da kafo** (él no bebe la taza misma, sino la cantidad de café contenida en la taza).

$$\text{Dek du} = 10 + 2 = 12$$

$$\text{Dudek} = 2 \times 10 = 20$$

$$\text{Dudek du} = 2 \times 10 + 2 = 22$$

Cuando los números se **suman**, se escriben **separados**; cuando éstos se **multiplican**, se escriben **juntos**.

Con sólo aprender **13 palabras** se puede contar en Esperanto hasta 999.999.999.

ĈE – *en ese lugar, en lo de, en casa de, cabe*: **Hieraŭ mi manĝis ĉe Petro** – *ayer comí en casa de Pedro*; **sidi ĉe tablo** – *sentarse a la mesa*; **ĉeesti** – *asistir, estar presente*; **mi ĉeestis la batalon** – *yo asistí a la batalla*.

ONI es el pronombre indefinido *se, uno*: **ofte oni aŭdas la demandon...** – *a menudo se oye la pregunta...*; **oni diras** – *se dice*; **oni ne scias kion fari** – *uno no sabe qué hacer*.

KIOM AĜA VI ESTAS? – *¿Qué edad tiene usted?* (literalmente, ¿de cuanta edad es usted?) También se suele preguntar **Kiom jara vi estas?** – *¿Cuántos años tiene usted?* (¿de cuántos años es usted?) **Mi estas dudek-ses-jara** – *tengo veintiséis años* (soy de veintiséis años). Porque los años es difícil “tenerlos” y “detenerlos”.

MI NE SCIAS. Si tiene dificultad para pronunciar la **sc**, trate de acostumbrarse uniendo la **s** de **scias** a la vocal anterior: **mi nes-cias**.

KIOMA HORO ESTAS? Para preguntar la hora añadimos la terminación **a** del adjetivo a **kiom** – *“Cuánta” hora es?*: **Estas la tria horo kaj dek minutoj** – *son las tres horas* (es la tercera hora) y *diez minutos*. En el lenguaje corriente, suele suprimirse, como en Español, **horo** y **minuto**: **estas la tria kaj dek.**


ADJETIVOS ORDINALES son los que expresan el orden en que están colocadas las cosas; *primero, segundo, etc.*, que se forman agregando la terminación **a** a los numerales simples, y los usamos siempre al referirnos a cosas que siguen un orden: *las horas del día, los días del mes, las páginas del libro, etc.*: **la 1-a de majo** – *el 1º de mayo*, **la dua (2-a) paĝo** – *la segunda página*, **la dudek-sepa paĝo...** Aquí en español abandonamos el uso lógico del ordinal y decimos “*la página veintisiete*”, en lugar de la “*página vigésima séptima*”, por resultar pesado el uso de los ordinales en castellano.

9-a LECIONO


Rigardu la belan **torton!** Ĝin faris Maria **el faruno, ovoj, sukero, butero**, k.t.p. En la **mezo** estas ruĝa ĉerizo.

Ĉu vi ŝatas torton kun kremo kaj ĉokolado? Ĝi havas belan aspekton, **ĉu ne?**

Ĉu vi povas manĝi **tutan** torton?
Ne, sinjoro, mi povas manĝi **nur pecon**; unu **kvaronon** ($1/4$) de la torto.



Ĉu vi, fraŭlino, deziras manĝi alian kvaronon? **Ĉu jes?**



Mi, la instruisto, ankaŭ manĝos pecon, kaj la lastan kvaronon ni **lasos** por Petro, kiu **ankoraŭ** ne venis al la klaso.

Do, ni povas ankaŭ diri: la deka (horo) kaj kvarono (da horo), la deka kaj duono, la deka kaj tri kvaronoj aŭ kvarono antaŭ la dek-unua.

Karlo estas 20-jara. Roberto estas 40-jara. Do, la aĝo de Karlo estas la duono de la aĝo de Roberto.

La aĝo de Roberto estas la duoblo de la aĝo de Karlo. 40 estas la duoblo de 20.

Kiom estas la duoblo de 6, de 5, de 100?

Vi estas bona knabo, mi donos al vi duoblan **porcion** da kuko. Mi donos al vi parton duoble grandan.

9 estas la trioblo de 3. 100 estas la dekoblo de 10.

Kiom estas la dekonono de 100?

Unu centavo estas la centono de unu peso.


Jen tri utilaj kaj **simpatiaj** bestoj.

—Ĉu via hundo dormas sub via lito?

—Jes, **kelkfoje** ĝi dormas tie.

—Ĉu bovo povas dormi sub via lito?

—Ne, la bovo estas tro granda; bovo estas **pli** granda **ol** hundo.



Kaj elefanto estas pli granda ol bovo, ĝi ankaŭ estas pli forta. Sed la bovo kaj la bovino estas pli utilaj por ni ol la elefanto. El la bovino ni tiras la bonan, **nutran** lakton.

El la tri bestoj, kiujn ni vidas sur la bildo, la elefanto estas la **plej** granda. Sed la plej granda el ĉiuj bestoj estas la baleno.

Kanario kantas pli bele ol kokino, sed la ovoĵ de la kokino estas pli grandaj ol tiuj (la ovoĵ) de la kanario.

Petro diras: La plej bela knabino en la mondo estas Maria. Ŝi ankaŭ estas la plej bonkora kaj ŝi faras la plej bongustajn tortojn kun ĉerizo en la mezo.

Ĉu vi estas la plej bona lernanto de la klaso?

Kiu estas la plej alta monto en la mondo?

Kiu estas la plej granda rivero en Ameriko?

Kiu laboras pli, vi aŭ via frato?

Ĉu Esperanto estas pli facila ol latino?

Esperanto estas la plej facila lingvo.

Sinjoro, mi faras al vi malfacilan demandon: Ĉu la viroj estas pli inteligentaj ol la virinoj?

Kion vi **opinias**? Ĉu vi **kuraĝos** diri vian opinion?

–Ĉu vi deziras **iom** da teo kun lakto por trinki kun la torto?

–Jes, sed ne donu al mi **tiom** multe! Mi deziras trinki nur **iomete** da teo.

–Ĉu vi deziras pli da teo ol da lakto?

–Donu al mi duonon kaj duonon: tiom da teo **kiom** da lakto.

Mi parolas Esperanton, ŝatas la pacon kaj la kunlaboron inter la diversaj **popoloj**. Vi ankaŭ parolas la internacian lingvon kaj deziras la pacon. Ni havas la **saman ideon**. Ni estas **samideanoj** (= anoj –membroj– de la sama ideo).

La personoj, kiuj parolas la saman lingvon, estas samlingvanoj. La homoj, kiuj loĝas en la sama lando, estas samlandanoj. En Ameriko loĝas la amerikanoj.

Kie loĝas la afrikanoj? Kiuj loĝas en Eŭropo?

Ĉu vi kaj via patro loĝas en la sama domo?

LAKTO POR URBANOJ

Urbano – Kiom da lakto vi ricevas ĉiutage de via bovino?

Kampano – Dek litrojn.

Urbano – Kaj kion vi faras per la lakto?

Kampano – Tri litrojn mi bezonas por mia familio kaj dek du litrojn mi vendas en la urbo.

VOCABULARIO

BUTERO	<i>MANTECA, MANTEQUILLA</i>	KURAĜA	<i>VALIENTE</i>
ĈERIZO	<i>CEREZA</i>	NUTRA	<i>NUTRITIVO</i>
FARUNO	<i>HARINA</i>	SAMA	<i>MISMO, IGUAL</i>
IDEO	<i>IDEA</i>	SIMPATIA	<i>SIMPÁTICO</i>
KNABO	<i>MUCHACHO</i>	TUTA	<i>TOTAL</i>
KREMO	<i>CREMA</i>	UTILA	<i>ÚTIL</i>
LANDO	<i>PAÍS</i>	LASI	<i>DEJAR</i>
OVO	<i>HUEVO</i>	OPINII	<i>OPINAR</i>
MEZO	<i>MEDIO, CENTRO</i>	RICEVI	<i>RECIBIR</i>
PACO	<i>PAZ</i>	ANKORAŬ	<i>TODAVÍA, AÚN</i>
PECO	<i>PEDAZO</i>	IOM	<i>ALGO, ALGUNA CANTIDAD</i>
POPOLO	<i>PUEBLO</i>	TIOM	<i>TANTO</i>
PORCIO	<i>PORCIÓN</i>	DUM	<i>DURANTE</i>
TORTO	<i>TORTA</i>	AŬ	<i>O, U</i>

LA INSTRUISTO PAROLAS

-ON. Este sufijo forma los numerales partitivos: **duono** – *un medio*; **okono** – *un octavo* [**Okono** – *octavo* (fracción), **oka** – *octavo* (ordinal)].

MEZO – **DUONO** no deben confundirse. **Mezo** es *el medio, el lugar que señala la mitad*: **tagmezo** – *medio día* (las 12 hs.), mientras que **duontago** es *la mitad del día* (de 6 a 12 hs.). **Mi laboris dum duontago: de la oka ĝis tagmezo** – *Trabajé medio día; de las ocho hasta medio día* (las 12 hs.). **Mezeŭropo** – *Europa central*. **Mezepoko** – *Edad Media*.

-OBL forma los *múltiplos*: **duobla** – *doble*, **duoblo** – *el doble*, **double** – *doblemente*.

PLI OL, MALPLI OL – (*más que, menos que*) son los comparativos: **la viroj estas pli fortaj ol la virinoj** – *los hombres son más fuertes que las mujeres*; **la virinoj estas malpli fortaj ol la viroj** – *las mujeres son menos fuertes que los hombres*. **Plimalpli** – *más o menos*.

LA PLEJ, LA MALPLEJ – (*el, la*) *más, (el, la) menos*, son los superlativos relativos. **Pli ol** compara con otra u otras cosas, **la plej** compara con todas: **Petro estas pli bona lernanto ol Karlo** – *Pedro es mejor alumno que Carlos*. **El ĉiuj lernantoj Roberto estas la plej bona** – *de todos los alumnos Roberto es el mejor*.

EL SUPERLATIVO ABSOLUTO se forma con el adverbio **tre** – *muy*: **Ŝi diris al mi tre afablajn vortojn** – *ella me dijo palabras muy amables*; **li laboras tre rapide** – *él trabaja muy rápido* (rápidamente).

EL – *de, de entre* (con idea de extracción, de salida): **preni el la poŝo** – *sacar del bolsillo*; **unu el vi** – *uno de vosotros*. Se usa también esta preposición para indicar material con que está hecha una cosa: **glaso el vitro** – *un vaso de vidrio*. Usado como prefijo, **el** indica *salida, movimiento de dentro hacia afuera*: **iri** – *ir*, **eniri** – *entrar*, **eliri** – *salir*; **spiri** – *respirar*, **enspiri** – *inspirar*, **elspiri** – *expirar*.

DO – *pues, luego, por consiguiente*: **li ne ricevis la leteron, do li ne venis** – *él no recibió la carta, por consiguiente no vino*. **Ĉu vi ŝatas la torton? ĉu jes? manĝu do!** – *¿Te gusta la torta? ¿sí? ¡come pues!*

ĈU NE? – *¿No es así? ¿no?* **Morgaŭ vi venos, ĉu ne?** – *mañana vendrá Ud. ¿no es así?*

AŬ es la conjunción *o, u*: **Ĉu vi trinkos teon aŭ kafon?** *¿Beberás té o café?*; **jes aŭ ne?** *¿sí o no?*

IOM indica *cantidad indefinida, algo*. Pero en el lenguaje corriente se usa **iom** para señalar una pequeña cantidad: **donu al mi iom da supo** – *déme un poco (algo) de sopa*. **Iom post iom** – *poco a poco*.

KELKFOJE = **kelkaj fojoj** – *a veces, alguna vez*.

-**AN**, sufijo que indica *el miembro de una colectividad, el adepto, el habitante*: **Kristo, kristano** – *cristiano*; **amerikano**, *americano*; **akademiano** – *miembro de la academia*; **urbano** – *habitante de una ciudad*; **kamparano** – *campesino, habitante de la campaña*.


10-a LECIONO

En la 8-a leciono ni parolis **pri** diversaj horloĝoj. Kaj ni **forĝesis** pri grava membro de la horloĝa familio. Ni forĝesis pri la **vekhorloĝo**. Ĝi estas **mekanika** koko. La koko vekas la kokinojn. Kaj la vekhoroĝo vekas la homojn en la **mateno**.

Kio vekas vin matene (=en la mateno), ĉu koko aŭ vekhoroĝo? Ĉu via patrino vekas vin? Ĉu la vekhoroĝo estas simpatia aparato? Ĉu vi ŝatas ĝian **muzikon**?

Kiam mi aŭdas la belan muzikon de mia mekanikla koko mi saltas el la lito, lavas min, **vestas** min (mi surmetas miajn vestojn), matenmanĝas kaj iras rapide al mia laboro. Tie mi **salutas** miajn kamaradojn: **Bonan tagon!** La dekdua horo estas la mezo de la tago aŭ tagmezo. **Tiam** mi faras **paŭzon** en mia laboro kaj **tagmanĝas** kun bona apetito. Post la tagmezo (= post-tagmeze) mi **denove** laboras **ĝis** la **vespero** (18-a aŭ 19-a horo). Tiam mi iras al mia **hejmo** por **ripozi** kaj **vespermanĝi** kun mia familio. **Dum** la vespero, mi kelkfoje iras al la teatro, **kinejo** aŭ vizitas la Argentinan Esperanto-Ligon. Kiam mi eniras mi salutas: Bonan vesperon, samideanoj! Kiam mi **foriras** de la **societo** mi diras **bonan nokton** al miaj bonaj amikoj kaj iras dormi. **Je noktomezo** (24-a horo) mi jam kuŝas en mia **mola** kaj varma lito. Kia granda invento estas la lito! Bonan dormon!

- Matene oni matenmanĝas.
- Tagmeze oni tagmanĝas.
- Vespere oni vespermanĝas.
- Je kioma horo vi matenmanĝas?
- Mi matenmanĝas je la sepa.



Je kioma horo vi tagmanĝas? Je kioma horo vi vespermanĝas? Ĉu vi vespermanĝas kun via familio? Ĉu vi ŝatas matenmanĝi en la lito? Kion vi faras en la mateno? Ĉu vi legas la ĵurnalon? Ĉu vi faras sporton?

Ĉu vi **banas** vin? Ĉu vi kantas en la banĉambro? Ĉu vi loĝas proksime de via laboro? Ĉu vi iras **piede** aŭ vi veturas? Ĉu vi povas sidi en la aŭtobuso?

Kion la homoj faras dum la tago? Kion ili faras dum la nokto? Dum vi dormas, aliaj homoj laboras. Kiam vi dormas? Kiam vi promenas? Ĉu vi ŝatis la supon kiam vi estis infano? Ĉu vi vizitos dancejojn kiam vi estos tre maljuna?

Ĉu vi **iam** estis en Afriko?

Ne, sinjoro, mi **neniam** estis tie.

Ĉu vi iam manĝis **bifstekon** de elefanto?

Ne, mi neniam manĝis tion.

Mia patro ĉiam (=en ĉiu momento, en ĉiu tempo) estas gaja, neniam li estas malgaja. Li ĉiam diras: “**Menso** sana en korpo sana kaj gaja koro en sana korpo”.

Mi **gratulas** vian patron.

Kia estas via koro? Ĉu vi ankaŭ estas ĉiam gaja? Ĉu via instruisto ofte gratulas vin?

En la ĝardeno Maria diris al Petro: “Ĉu vi ĉiam amos min? Ĉu vi memoros ĉiam pri mi?” –“Jes, mia kara” –respondis Petro– “Mi ĉiam amos vin kaj neniam mi forgesos vin.”

Ĉu ankaŭ vi ŝatas promeni en parko sub la steloplena ĉielo kaj diri dolĉajn vortojn?

Dum la nokto la manoj kaj piedoj, la korpo ripozas. La koro ne ripozas: ĝi ĉiam funkcias. Dum la homo vivas la koro neniam **haltas**.

En la mateno **unue** (1-e) mi lavas min, **due** (2-e) mi vestas min kaj **trie** (3-e) mi matenmanĝas.

Dialogo

–Bonan tagon, amiko, ĉu vi memoras pri mi?

–Vi tute eraras: Unue la tago ne estas bona, due mi ne estas via amiko kaj trie mi ne deziras memori pri vi.

Kion vi faras unue en la mateno? Kion vi legas unue en la ĵurnalo?

TRO MALALTA HOTELO

Vojaĝanto. –Kiom kostas ĉambro en via hotelo?

Hotelisto. –En la unua **etaĝo** 50 eŭrojn, en la dua 40 eŭrojn, en la tria 30 eŭrojn kaj en la kvara 20 eŭrojn.

Vojaĝanto. –Ĉu vi ne havas pli da etaĝoj?

Hotelisto. –Ne, sinjoro.

Vojaĝanto. –Do, via hotelo estas **tro** malalta por mi.

Ĉu vi ŝatas la proverbojn?

Kiom da kapoj, tiom da gustoj = Kiom da kapoj, tiom da opinioj.

Plej bone ridas, kiu laste ridas.

Pli bona estas afabla **vorto**, ol granda torto.

VOCABULARIO

BIFSTEKO	<i>BISTEC, BIFE</i>
ETAĜO	<i>PISO (1°, 2°)</i>
FAMILIO	<i>FAMILIA</i>
HOTELO	<i>HOTEL</i>
KAMARADO	<i>CAMARADA</i>
KINEJO	<i>CINE</i>
KOKO	<i>GALLO</i>

KORPO	<i>CUERPO</i>
MATENO	<i>MAÑANA</i>
MEKANIKO	<i>MECÁNICA</i>
MEMBRO	<i>MIEMBRO</i>
MENSO	<i>MENTE</i>
MUZIKO	<i>MÚSICA</i>
PAŬSO	<i>PAUSA, INTERVALO</i>

SUBVESTO	<i>ROPA INTERIOR</i>	KOSTI	<i>COSTAR</i>
VESPERO	<i>HORAS</i> <i>VESPERTINAS</i>	RIDI	<i>REÍR</i>
VESTO	<i>VESTIDO EN</i> <i>GENERAL</i>	RIPOZI	<i>REPOSAR</i>
VORTO	<i>PALABRA,</i> <i>VOCABLO</i>	SALUTI	<i>SALUDAR</i>
MOLA	<i>BLANDO, MUELLE</i>	VEKI	<i>DESPERTAR</i>
FORGESI	<i>OLVIDAR</i>	IAM	<i>ALGUNA VEZ</i>
FUNKCII	<i>FUNCIONAR</i>	KIAM	<i>CUÁNDO</i>
GRATULI	<i>FELICITAR,</i> <i>GRATULAR</i>	TIAM	<i>ENTONCES</i>
HALTI	<i>HACER ALTO,</i> <i>DETENERSE</i>	ĈIAM	<i>SIEMPRE</i>
		NENIAM	<i>NUNCA</i>
		TRO	<i>DEMASIADO</i>
		DUM	<i>DURANTE,</i> <i>MIENTRAS</i>
		DENOVE	<i>NUEVAMENTE</i>

LA INSTRUISTO PAROLAS

BONAN TAGON lleva la **n** del acusativo por ser el complemento directo de **mi deziras**: **Mi deziras al vi bonan tagon** – *le deseo a usted un buen día*. (Le deseo ¿qué cosa? – un buen día). Lo mismo ocurre con **bonan nokton** – *buenas noches*; **feliĉan feston** – *felices fiestas*; **bonan apetiton** – *buen provecho* (= buen apetito); **dankon** – *gracias* (va en singular).

VESPERO es la *parte del día opuesta a la mañana*, entre la caída del sol y media noche. Es lo que en castellano llamamos la parte vespéral o vespertina del día. De acuerdo a la costumbre de varias lenguas, se dice en Esperanto **bonan vesperon** al encontrarse con otros y **bonan nokton** al retirarnos.

PRI es una preposición que significa *acerca de, concerniente a, sobre*: **la profesoro parolis pri moderna literaturo** – *el profesor habló sobre literatura moderna*. **Pri tio mi ne volas paroli** – *acerca de eso yo no quiero hablar*.

PIEDE, MANE significan *pedestremente, manualmente*. Pero estos adverbios son poco usados quizás por demasiado largos y los reemplazamos por los modos adverbiales “*a pie*”, “*a mano*”. **Matene, tage, nokte** y otros muchos ya no tienen equivalente en castellano y debemos decir “*por, en, durante la mañana*”, etc. También en Esperanto podemos usar modos adverbiales: **dum la mateno** (= **matene**). No confunda **tage** - *de día* (durante el día) con **ĉiutage** - *diariamente, cada día*: **Mi laboras nokte** (= **dum la nokto**) - *yo trabajo de noche*, **mi laboras ĉiunokte** - *yo trabajo todas las noches*. Otros adverbios: **hejmo** - *hogar*, **hejma** - *hogareño*, **hejme** - *en el hogar, en la casa*: **esti hejme** - *estar en casa*. Hay algunos adverbios simples –no derivados– que no llevan la terminación **e**: **hieraaŭ, morgaaŭ, nun** - *ahora*, **for** - *lejos*.

FOR significa alejamiento: **iri** - *ir*, **foriri** - *marcharse*, **forkuri** - *alejarse corriendo*, **forflugi** - *alejarse volando*. **Li loĝas for de la urbo** - *él habita fuera de la ciudad*, **la fora sudo** - *el lejano sur*, **for!** - *fuera!* **For de l' okuloj, for de la koro** - *lejos de los ojos, lejos del corazón*.

UNUA, UNUE, UNUO. Los números cardinales pueden convertirse en adjetivos: **unu (1)**, **unua (1-a)** - *primero*; adverbios: **unue (1-e.)** - *primeramente, en primer lugar*, **trie** - *en tercer lugar*, etc. O en sustantivos: **unu** - *la unidad*, **duo** - *un par*, **trio** - *un grupo de tres, un trío*, **deko** - *una decena*, **dekduo** - *docena*, **cento** - *centena*, **milo** - *millar*.

PREPOSICIONES. **Al, en, sur, sub, el, kun, de, da, pri** son preposiciones, así llamadas porque preceden al nombre o pronombre. El buen uso de las preposiciones es muy importante, puesto que relacionan las palabras entre sí: *el libro está **sobre** la mesa, el perro está **bajo** la mesa*.



Los nombres y pronombres que sigan a una preposición, no llevan **n** del acusativo, pues la relación está ya señalada por la preposición: **Mi trinkas kafon kaj lakton. Mi trinkas kafon kun lakto. Mi aĉetis dek pomojn** - *yo compré diez manzanas*, **mi aĉetis dekon da pomoj** - *yo compré una decena de manzanas*. Las preposiciones son invariables; no cambian de forma.

11-a LECIONO

La seĝo staras malproksime.

Petro **montras** per la fingro kaj diras:
Tio estas seĝo.


La seĝo staras tie. Tie estas la seĝo.




Petro staras apud la tablo kaj diras:
Tio ĉi (= ĉi tio) estas tablo. La tablo estas
ĉi tie (= tie ĉi). Tie ĉi estas la tablo.

Kion montras Petro? Per kio li
montras? Ĉu iu sidas sur la seĝo?

Alberto staras malproksime de
Petro. Petro montras lin per la
fingro kaj diras: Alberto estas tie.
Tiu sinjoro, kiu staras tie, estas
Alberto.





Petro kaj Alberto staras apude. Petro parolas: Alberto estas ĉi tie. Tiu ĉi sinjoro estas Alberto. Tiu ĉi sinjoro, kiu staras apud mi, estas Alberto. Ĉu vi konas lin? Kiu montras Alberton? Kiun montras Petro? Kie estas Alberto? Ĉu tiu ĉi leciono estas la dua?

TIE, TIU, TIO – malproksime.

TIE ĈI, TIU ĈI, TIO ĈI – proksime.

Ĉu vi konas tiun ĉi aparaton? Ĝi estas la termometro.

Ĝi pendas sur la muro kaj montras la temperaturon en la diversaj partoj de la jaro.

20 gradoj estas tre agrabla temperaturo; estas **varmeta**.


Sed 30 gradoj estas jam varma temperaturo. Ni malfermas pordojn kaj fenestrojn.

40 gradoj estas jam tre varma temperaturo, **varmega** temperaturo. Tiam la **nudistoj** estas feliĉaj.

Tre agrabla temperaturo estas 15 gradoj; estas malvarmeta vetero.

Kiam la termometro montras **nulon** (0), tiam ni fermas pordojn kaj fenestrojn; estas malvarme.

Ofte dum vintraj matenoj, la termometro montras kelkajn gradojn sub nulo. Tiam la nudistoj estas malfeliĉaj. Ĉu vi ŝatas forlasi la varman liton en tiaj malvarmegaj matenoj?



Li ridas.
Sana homo ofte ridas.



Li ridegas.
Li estas tre gaja, li **laŭte** (= forte) ridas, li ridegas.



Li ridetas.
Li estas ĝoja, li ridetas.
Li vidas belan fraŭlinon, li afable ridetas.
La rideto malfermas la korojn.



Proksime de Montevideo estas malgranda monto; ĝi estas nur monteto.

Amazono estas riverego. Nov-Jorko estas urbego.


Bonan vesperon, amikoj. Kia estas la **vetero** hodiaŭ?

Dum la monato februaro, en Sudameriko, la vetero estas varma, estas **somero**. Sed en Eŭropo, februaro estas malvarma monato, tie estas **vintro**.

Somero kaj vintro estas partoj (**sezonoj**) de la jaro. La aliaj du sezonoj estas **printempo** kaj **aŭtuno**.



Dum printempo la ĝardenoj floras, la birdoj **ĝoje** kantas kaj faras komfortajn **rondajn** hejmojn. La koro de la junaj viroj (**junuloj**) kaj la koro de la junaj virinoj (junulinoj) forte batas. Ili facile amas dum printempo. Agrabla, sed danĝera sezono!



La suno forte brilas en la somero. Estas varme. Kelkfoje estas varmege. La viroj portas malpezaj vestoj.

La vestoj de la fraŭlinoj estas ankaŭ malpezaj, mallongaj kaj... tre interesaj. Oni trinkas malvarman **bieron**.

Somere multaj homoj **ferias**, kelkaj iras al la maro, aliaj iras al la montoj kaj aliaj restas hejme... Tiam estas tre agrable naĝi en la maro, en rivero aŭ en banĉambro. For la vestojn! Vivu la blua maro kaj la freŝa ombro!

Poste venas la aŭtuno. Dum aŭtuno estas multaj fruktoj, sed la arboj iom post iom perdas la foliojn. La flavaj folioj **falas** kaj kuŝas sur la tero. Kiam la aŭtuna vento **blovas**, la folioj dancas kaj flugas. La birdoj forflugas al pli varmaj landoj. Tiu ĉi estas la malĝoja sezono.



Kaj jen venas la malvarma vintro. Dum tiu ĉi sezono la arboj estas **nudaj**, sed la homoj surmetas multajn dikajn lanajn vestojn, **surtutojn**. Dum la malvarmaj vintraj vesperoj estas **agrabla** sidi apud la gaja, brila fajro.

Blanka **neĝo** ofte falas kaj blovegas malvarma **suda** vento. Tiam la vetero estas malvarmega. Dum vintro la **nazoj** estas ruĝaj.

Estas la sezono de la **nasztukoj**. Kelkaj personoj faras vintrajn sportojn sur la neĝo. Por la **riĉaj** homoj (= riĉuloj), ĉiuj sezonoj estas bonaj. Por malriĉuloj kaj birdetoj, vintro estas **kruela** sezono. Pluvo, neĝo, vento; kia vetero!

Kia estis hieraŭ la vetero? En kiu sezono ni estas nun? Kia estas la vetero dum julio en tiu ĉi lando? Kiu sezono estas por vi la plej bela? Kiam la junaj (ankaŭ nejunaj) koroj forte batas?

Kiam estas varmege? Kion vi faras dum viaj ferioj? Ĉu vi scias naĝi?

Ĉu vi ŝatas trinki varman ĉokoladon dum somero? Kia estas la somero?

Kiam vi portas surtuton? Kia estas la vintro?

Dum printempo la tagoj kaj noktoj estas **egalaj** (=). La tagoj estas **tiel** longaj **kiel** la noktoj. Dum somero la tagoj estas pli longaj ol la noktoj. Ankaŭ en aŭtuno la noktoj estas tiel longaj kiel la tagoj. Sed en la vintro la noktoj estas pli longaj; ili estas pli longaj ol la tagoj. Dum printempo la vetero estas **nek** varma nek malvarma; ĝi estas varmeta aŭ malvarmeta.

Kiam la tagoj estas pli longaj ol la noktoj?

Kiam ili estas egallongaj? Ĉu vi estas tiel alta kiel via patro?

La infanetoj estas agrablaj kiam ili ridas aŭ ridetas, sed tre ofte ili ploras kaj ploregas kaj tiam ili ne estas agrablaj. La sanaj infanoj ofte ridas: ili esta **ridemaj**. La malsanemaj infanoj estas ankaŭ ploremaj.

Persono, kiu multe legas estas legema (li sentas **inklinon** legi).

La junuloj estas sportemaj. La plenaĝuloj **emas** sidi kaj **babili** kun amikoj.

Ĉu vi estas legema, skribema, vojaĝema, demandema, babilema, dormema, laborema? Kian emon vi havas?

La legemulo (= legema homo) neniam perdas tempon; ĉiam li havas ion por fari: legi. Kiam la vetero estas malbona la legemulo ne perdas la tempon; li sidas kaj legas interesan libron.

Kion vi faras dum pluva vetero?

Tiu ĉi lernolibro **konsistas** el 20 lecionoj. Tiu ĉi leciono estas la dek-unua. Vi, do, **jam** lernis la duonon de la libro. Vi estas duonesperantisto.

VOCABULARIO

AŬTUNO	<i>OTOÑO</i>	SURTUTO	<i>ABRIGO,</i>
FAJRO	<i>FUEGO</i>	(SUR-TUTO)	<i>SOBRETUDO</i>
FERIO	<i>FERIADO,</i>	TEMPERATURO	<i>TEMPERATURA</i>
	<i>VACACIONES</i>	TERMOMETRO	<i>TERMÓMETRO</i>
FOLIO	<i>HOJA</i>	VESTO	<i>ROPA</i>
GANTO	<i>GUANTE</i>	VETERO	<i>TIEMPO,</i>
GRADO	<i>GRADO</i>		<i>ESTADO</i>
LANO	<i>LANA</i>		<i>ATMOSFÉRICO</i>
MONTO	<i>MONTE,</i>	VINTRO	<i>INVIERNO</i>
	<i>MONTAÑA</i>		
NAZO	<i>NARIZ</i>	AGRABLA	<i>AGRADABLE</i>
NEĜO	<i>NIEVE</i>	DANĜERA	<i>PELIGROSO</i>
NULO	<i>CERO</i>	EGALA	<i>IGUAL</i>
PERSONO	<i>PERSONA</i>	KRUELA	<i>CRUEL</i>
PRINTEMPO	<i>PRIMAVERA</i>	NUDA	<i>DESNUDO</i>
PLUVO	<i>LLUVIA</i>	RIĈA	<i>RICO</i>
SEZONO	<i>ESTACIÓN</i>	BABILI	<i>CHARLAR</i>
	<i>DEL AÑO</i>	BLOVI	<i>SOPLAR</i>
SOMERO	<i>VERANO</i>	FALI	<i>CAER</i>
SPORTO	<i>DEPORTE</i>	ĜOJI	<i>REGOCIJARSE</i>
SUDO	<i>SUR</i>	KONSISTI	<i>CONSISTIR</i>

PERDI	<i>PERDER</i>
PLORI	<i>LLORAR</i>
PREFERI	<i>PREFERIR</i>
TIA	<i>TAL</i>

La monatoj	los meses
JANUARO	<i>ENERO</i>
FEBRUARO	<i>FEBRERO</i>
MARTO	<i>MARZO</i>

APRIL	<i>ABRIL</i>
MAJO	<i>MAYO</i>
JUNIO	<i>JUNIO</i>
JULIO	<i>JULIO</i>
AŬGUSTO	<i>AGOSTO</i>
SEPTEMPRO	<i>SEPTIEMBRE</i>
OKTOBRO	<i>OCTUBRE</i>
NOVEMBRO	<i>NOVIEMBRE</i>
DECEMBRO	<i>DICIEMBRE</i>

LA INSTRUISTO PAROLAS

PLUVAS, NEĜAS. Sin duda habrá usted observado que en Esperanto, debido a la simplicidad de sus verbos, éstos deben ir siempre acompañados de sujeto –como en inglés o francés– : *Leo un libro* - **MI legas libron**. Pero van sin sujeto, como en castellano, los verbos impersonales como **pluvas, neĝas**.

Tampoco llevan sujeto el imperativo de la segunda persona: **venu!** – *ven!* **Ne faru tion!** – *no hagas eso!*

-**UL.** Este sufijo indica al *ser caracterizado por lo que expresa la raíz*: **junulo** – *un joven* (un individuo joven), **junulino** – *una joven*, **riĉulo** – *un rico*, **malriĉulo** – *un pobre*, **maljunulo** – *un viejo*, **mamulo** – *un mamífero* (un animal, un individuo mamífero), **etulo** – *un chico, un pequeñuelo*. **Ulo** es *un individuo*, tiene un sentido un tanto despectivo: **Kia ulo!** – *qué sujeto! qué individuo!*

-**EM** denota *inclinación, tendencia, hábito*: **babilema** – *hablador*, **dormema** – *dormilón*, **manĝema** – *comilón, glotón*. **Muzikema** – *melómano*.

Mi sentas dormemon – *Yo tengo sueño* (yo siento deseos de dormir).

No confunda **laborema junulo** – *un joven trabajador* (un joven que tiene inclinación al trabajo), con **juna laboristo** – *un joven obrero* (que puede no tener amor al trabajo).

TIA – *tal, de tal clase;* **Ĉu tian libron vi legas?** – *esa clase de libro lees?* **Tia estas la afero** – *ése (tal, así) es el asunto,* **kia patro, tia filo** – *tal padre, tal hijo,* **kia arbo, tia frukto** – *tal árbol, tal fruto.* **Mi aĉetis ĝin tia, kia ĝi estas** – *yo lo compré tal cual es (está).*

NEK – *ni.* **Estas nek varme nek malvarme** (= **ne estas varme nek malvarme**) – *no hace calor ni frío, venis nek Petro nek Antonio* – *no vino Pedro ni Antonio.*

NAZTUKO es una palabra compuesta: **naz-tuko** – *pañuelo* (para la nariz). En español la definición de pañuelo es “*Pedazo de tela, pequeño y cuadrado, que sirve para diferentes usos*”. Esta definición vale para **tuko**, sólo que **tuko** puede no ser pequeño, ni es siempre cuadrado: **poŝtuko** – *pañuelo de bolsillo,* **koltuko** – *pañuelo para el cuello,* **littuko** – *sábana,* **tablotuko** – *mantel,* **antaŭtuko** – *delantal.*

ĈI, partícula adverbial que indica *aproximación*: **ĉi tie** (= **tie ĉi**) – *aquí,* **tio ĉi** – *esto,* **tiu ĉi** – *este,* **ĉio ĉi** – *todo esto,* **ĉifoje** – *esta vez,* **ĉijara** – *de este año,* **ĉijare** – *en este año.*

-ET es el sufijo con el que *se forman los diminutivos*: **dometo**: *casita,* **infaneto** – *niñito,* **urbeto** – *pequeña ciudad,* **varmeta** – *tibio,* **malvarmeta** – *fresco;* **kanteti** – *canturrear,* **dormeti** – *dormitar,* **rideti**, *sonreír.* Usado con terminación: **eta** (= **malgranda**) – *pequeño.*

-EG es el sufijo con el que *formamos los aumentativos*: **pordego** – *portón,* **domego** – *caserón,* **pluvego** – *aguacero,* **chaparrón** (**pluveto** – *llovizna*), **bonega** – *buenísimo, excelente,* **belega** – *bellísimo;* **ridegi** – *reír a carcajadas,* **pluvegi** – *llover a cántaros,* **ploregi** – *llorar a lágrima viva.*

12-a LECIONO



En la mateno mi lavas min, mi kombas min kaj mi rigardas min en la **spiegulo**.

Vi rigardas vin en la spegulo.

Li rigardas **sin** en la spegulo.

Ŝi rigardas **sin** en la spegulo.

Ĝi (la kato) rigardas **sin** en la spegulo.



Ni rigardas nin en la spegulo.

Vi rigardas vin en al spegulo.

Ili rigardas **sin** en la spegulo.

En la mateno Petro lavas siajn manojn, sian **vizaĝon**. Li kombas siajn harojn.

La patrino lavas sian filon. Ŝi lavas **lian vizaĝon**, **liajn manojn**, ŝi kombas liajn harojn.

Kion faras Petro matene? Kion vi faras matene? Kion faras la patrino? Kiun ŝi lavas? Ĉu via patrino lavas vin?

Karlo ne iras ĉe la razisto. Li mem razas sin per sia nova razilo.

Li razas **sian** barbon per **sia** razilo. Sed ankaŭ li razas Petron. Li razas **lian** barbon per **sia** razilo.

Foje Petro razas sin per la razilo de Karlo: li razas **sian** barbon per **lia** razilo.

Ĉu vi mem razas vin? Ĉu Karlo razas vin?



Mi libertempas ĉe mia frato. Li loĝas en la **kamparo**. **Tra** la fenestro mi rigardas kaj vidas grandan arbon. Pli malproksime estas multaj arboj; ili formas **arbaron**.

Sur la ĉielo unu, du, tri, kvar... multaj birdoj, tuta **birdaro** flugas en granda V.

Dum la libertempo mi legas. Mi aĉetis dikan libron. En ĝi estas **listo** da vortoj kun **difino** de ĉiu vorto: ĝi estas **vortaro**.

Jen feliĉulo. Li ne laboras. Li kuŝas sur la verda **herbo**, sub arbo, kaj dormas. Li dormas kaj **sonĝas**. En la sonĝo li havas multan monon (= multe da mono): li estas riĉulo. Dum la dormo lia **fantazio** libere flugas.



Ĉu vi ankaŭ havas fantazion?

Do, kion vi **farus se** vi estus riĉa? Ĉu vi vojaĝus tra la tuta mondo? Ĉu vi aĉetus blankan elefanton?

Se vi ne laborus, ĉu vi ankaŭ kuŝus sub arbo, sur la freŝa herbo?


“Se mi estus riĉa mi estus feliĉa”, diras sana malriĉulo.

“Se mi estus sana mi estus feliĉa”, diras malsana riĉulo.

Rigardu tiun ĉi sinjoron: li **demetis** siajn vestojn, li estas nuda.

Dum tiu ĉi sinjoro ne **surmetas** siajn vestojn, ni parolos pri la homa **korpo**.

Ni komencu ĉe la kapo. Sur ĝi estas la haroj (= hararo), kiuj povas esti brunaj, blondaj, ruĝaj, grizaj, nigraj aŭ blankaj. Foje la haroj tute ne estas... La **vizaĝo**, "spegulo de l' animo", estas fronte de la kapo. Sub la **frunto** estas du fenestroj, la **okuloj**, tra kiuj ni rigardas. Inter la okuloj estas la **nazo**. En la buŝo estas la **dentoj** kaj la lango. Per la buŝo ni spiras, parolas, manĝas, trinkas, Ĉe la buŝo estas la lipoj, **supra** kaj **malsupra**. Per la lipoj oni kiŝas – interesa laboro! Ambaŭflanke de la kapo estas la **oreloj**.




Inter la kapo kaj la **trunko** estas la **kolo**. La supra parto de la trunko estas la **brusto**. En ĝi estas la **pulmoj** kaj la koro. Malsupre estas la **ventro** kaj en ĝi la **stomako** kaj **intestoj**. La malantaŭa parto de la trunko estas La **dorso**.

Brakoj kaj **kruroj** (= **gamboj**) estas niaj membroj, supraj kaj malsupraj. Kruroj kaj piedoj subtenas kaj portas nin. Per la brakoj kaj manoj ni laboras. Tra la tuta korpo **fluas** la ruĝa **sango**. La **skeleto** (= **ostaro**) konsistas en multaj malmolaj **ostoj**.

Sur la tuta korpo estas natura vesto; ĝi estas la **haŭto**. La haŭto povas esti blanka, bruna. La haŭto de la **negroj** estas nigra aŭ ĉokoladkolora. Interesa maŝino la homa korpo, ĉu ne?

Kia kolora estas via hararo? Kian koloron havas viaj okuloj? Kio estas la "spegulo de l' animo"? Ĉu vi kisas per la nazo? Ĉu via hundo ŝatas ostojn?



Sed nia amiko devas vesti sin. Unue li surmetos la **subvestojn**: kalsono kaj ĉemizeto (= subĉemizo). Ĉe la piedoj li surmetas la **ŝtrumpojn**. La **ĉemizo** estas simpla kotona ĉemizo, sed kun bela **silka kravato**. La pantalono kaj la **jako** –la **kostumo**– estas el **lano**. La **ŝuoj** estas vestoj por la piedoj. Ŝuoj kaj gantoj estas el ledo.

Sur la kapo ni portas **ĉapelon** aŭ **ĉapon**.

Jupo kaj **subjupoj** kaj **bluzoj** estas virinaj vestoj. Virinoj portas silkajn aŭ **nilonajn ŝtrumpojn**.

VOCABULARIO

ANIMO	<i>ALMA</i>	KRAVATO	<i>CORBATA</i>
BLUZO	<i>BLUSA</i>	LANGO	<i>LENGUA</i>
BRUSTO	<i>PECHO</i>		<i>(órgano)</i>
ĈEMIZO	<i>CAMISA</i>	LEDO	<i>CUERO</i>
DENTO	<i>DIENTE</i>	LIPO	<i>LABIO</i>
DORSO	<i>ESPALDA, DORSO</i>	LISTO	<i>LISTA</i>
FANTAZIO	<i>FANTASÍA</i>	MONDO	<i>MUNDO</i>
FRUNTO	<i>FRENTE</i>	NILONO	<i>NYLON</i>
GAMBO	<i>PIERNA</i>	OKULO	<i>OJO</i>
HERBO	<i>HIERBA</i>	ORELO	<i>OREJA</i>
INTESTO	<i>INTESTINO</i>	OSTO	<i>HUESO</i>
JAKO	<i>CHAQUETA, SACO</i>	PULMO	<i>PULMÓN</i>
JUPO	<i>FALDA, POLLERA</i>	SILKO	<i>SEDA</i>
KOLO	<i>CUELLO,</i> <i>PESCUEZO</i>	SKELETO	<i>ESQUELETO</i>
KOSTUMO	<i>TRAJE</i>	SONĜO	<i>SUEÑO</i>
KOTONO	<i>ALGODÓN</i>	SPEGULO	<i>ESPEJO</i>
		STOMAKO	<i>ESTÓMAGO</i>

SUBJUPO	<i>ENAGUA</i>	VIZAĜO	<i>CARA, ROSTRO</i>
ŜTRUMPO	<i>MEDIA</i>	LIBERA	<i>LIBRE</i>
ŜTRUMPETO	<i>CALCETÍN</i>	SUPRA	<i>SUPERIOR (en el espacio)</i>
ŜUO	<i>ZAPATO</i>	MALSUPRA	<i>INFERIOR (en el espacio)</i>
TRUNKO	<i>TRONCO</i>	PRESKAŬ	<i>CASI</i>
VENTRO	<i>VIENTRE</i>		
VERO	<i>VERDAD</i>		

LA INSTRUISTO PAROLAS

PRONOMBRE REFLEXIVO. Cuando decimos: *María se mira en el espejo*, queremos decir: *María mira a María en el espejo*. La palabra **se** (a sí) que reemplaza a “María” es un pronombre reflexivo de la tercera persona. Es en la oración, el “reflejo” del sujeto, como la imagen en el espejo es el reflejo de María.

Es primera persona la que habla (yo, nosotros). Segunda persona es con quien se habla (tú, vosotros) y tercera persona, de quien se habla (él, ella, ello, ellos). En el modelo comparado que sigue se advertirá que también en español usamos el pronombre reflexivo **se**, en la tercera persona (él, ella, ello).

- Mi lavas min** – *Yo me lavo*
- Vi lavas vin** – *Tú te lavas*
- Li lavas sin** – *El se lava*
- Ŝi lavas sin** – *Ella se lava*
- Ĝi lavas sin** – *Ello se lava*
- Ni lavas nin** – *Nosotros nos lavamos*
- Vi lavas vin** – *Vosotros os laváis*
- Ili lavas sin** – *Ellos, ellas, se lavan*

Observe que:

- Ŝi lavas sin** – *Ella se lava*
- Ŝi lavas ŝin** – *Ella la lava (a otra)*

ADJETIVO REFLEXIVO. **Sia** es el adjetivo reflexivo que corresponde al pronombre reflexivo **si**: **María rigardas sian vizaĝon en spegulo** – *María mira su rostro en un espejo*.

Su es aquí el adjetivo reflexivo de tercera persona (de quien se habla). Al igual que **si**, **sia** es más preciso que el correspondiente “*su*” castellano; en la frase “*Él duerme en su pieza (habitación)*”, **su** indica sólo vagamente al poseedor de la pieza (su de Ud., de él, de ella); en esperanto no hay lugar a dudas: **Li dormas en sia ĉambro** (en la propia), **en via** (de Ud., tuya), **en ŝia** (de ella) **en ilia** (de ellos), etc.

María rigardas lian vizaĝon en spegulo (lian – su de él, el rostro de otra persona). **Petro promenis kun Karlo kaj lia patro** (lia – de él, de Karlo). **Petro promenis kun Karlo kaj sia patro** (sia – suyo, del sujeto de tercera persona, de Petro).

-US expresa *condición*. En el modo condicional la acción se efectúa si se cumple cierta *condición*: **Se ne pluvus, ni povus promeni** – *si no lloviese, podríamos pasear*. **Se mi havus tempon, mi mem farus ĝin** – *si yo tuviese tiempo, yo mismo lo haría*.

SE – *si* (conjunción condicional). **Se li ne pagas, mi ne laboras** – *si él no paga, yo no trabajo*. **Se li ne pagus, mi ne laborus** – *si él no pagase, yo no trabajaría*. **Se vi volas** – *si tú quieres*.

MEM – *mismo*. **Mi mem vidis la reĝon** – *yo mismo vi al rey*. **Mi vidis la reĝon mem** – *yo vi al mismo rey*. **Memamo = sinamo** – *amor propio*.

13-a LECIONO

–**Saluton**, samideano! Hieraŭ mi **atendis** vin en mia **hejmo**. Kial vi ne venis?

–Mi ne iris, **ĉar** mi estis iom malsana.

–Kia **bedaŭro!** Sed kial vi estis malsana?

–Ĉar mi **ĉeestis** feston kaj manĝis tro da **fritaĵoj**, tro da **sukeraĵoj** kaj **drinkis** tro da **alkoholaĵoj**.

Dum mi **restis** hejme malsana mi legis la **lastan** numeron de “Heroldo de Esperanto”. Tie mi trovis multajn novaĵojn kaj interesajn **legaĵojn**.

Kial la samideano ne vizitis sian amikon? Kial la samideano estis malsana? Kion li manĝis? Kion li trinkis? Ĉu vi ŝatas sukeraĵojn (bombonoj, ĉokolado, k.t.p.)? Ĉu vi ŝatas alkoholaĵon (rumo, viskio, konjako, k.t.p.)? Ĉu vi aŭskultas la novaĵojn per radio?



El sukero oni Faras
sukeraĵojn

Bone, samideano, mi **esperas**, **ke** **baldaŭ** vi estos tute sana kaj vizitos min. Vi vidos mian katon kaj mian hundon. Ili ne estas ordinaraj bestoj: ili vivas ne “kiel hundo kaj kato”; ili vivas en bona amikeco, en bona kamaradeco. Vi **admiras** la **belecon** de miaj du bestoj: la blankecon de mia hundo kaj la nigrecon de mia kato. La haroj de mia kato estas nigraj kaj silkecaj (havas la kvaliton de la silko), dum la haroj de mia hundo estas lanecaj (havas la kvaliton de lano). La hundo estas **fidela** amiko. Mi ŝatas la fidelecon de la hundo.

Dum la infaneco oni faras infanaĵojn. Dum la juneco oni faras heroaĵojn. Dum la maljuneco oni... memoras.

Ĉu vi bone memoras pri via infaneco? Ĉu vi ankoraŭ faras infanaĵojn?

–Ĉu vi spiras per la oreloj?

–Ne, sinjoro, mi spiras per la nazo kaj per la buŝo.

Oni spiras tra du **truoj** (naztruoj). Per tiuj du truoj oni ankaŭ **flaras** la **odorojn**. Per la oreloj ni aŭdas kaj per la fingroj ni tuŝas. Kaj per la lango –ĉiam malseka en la buŝo– ni gustumas la manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.

–Bone, gustumu tiun ĉi **oranĝon**. Kia ĝi estas?

–Fi!... tro acida, acidega; ĝi tute ne estas **manĝebla!**

La marakvo (= akvo de maro) ne estas trinkebla.

Tiu ĉi skribaĵo estas tre **malklara**. Ĝi estas preskaŭ **nelegebla**.

Dum **hela** vetero la montoj estas **klare** videblaj.

–Ĉu vi komprenas la signifon de la sufikso “aĵ”?

–Jes, mi komprenas. La sufikso “aĵ” montras konkretajn objektojn, aferojn, kiuj estas videblaj, tuŝeblaj, aŭdeblaj, fareblaj, **sentebaj**.

Per kio vi aŭdas? Per kio vi vidas, flaras, tuŝas, gustumas?

Ĉu varmega fero estas tuŝebla per la mano? Ĉu vi klare skribas?

Ĉu vi ŝatas helajn vestojn?

Per la sufiksoj **aĵ**, **ec**, **ebl**, oni formas vortojn. **Aĵo** signifas objekton, **eco** signifas kvaliton, **ebla**, **eble** signifas “povas esti”.

Kiel forgesema mi estas! Mi ne scias kie mi metis miajn aĵojn, eble mi lasis ilin ĉe Antono, eble ili estas en la oficejo. Mi ne memoras. Ĉu vi memoras kie vi lasas viajn aferojn?

LA HUNDETO

Petro estis tre malgaja. Karlo diris al li:

–Petro, kial vi estas tiel malgaja?

–Ĉar mi perdis mian karan hundeton.

–Kial vi ne **metas anoncon** en la ĵurnalon?

–Ĉar estus tute **senutile**, Karlo; mia hundeto ne scias legi!

Kial Petro estis malgaja? Kion diris Karlo? Kial Petro ne volis **meti** anoncon?

NEMANĜEBLA SUPO

Sinjoro sidis ĉe tablo de restoracio kaj **mendis** supon. Kiam la supo estis sur la tablo li diris:

–Tiun ĉi supon mi ne povas manĝi.

–Mi **tuj alportos** alian, sinjoro, diris la **kelnero**.

Kiam la nova supo **alvenis** la sinjoro denove diris:

–Tiun ĉi supon mi ne povas manĝi.

Tuj venis la mastro kaj demandis:

–Sed **kio okazas**, sinjoro, ĉu la supo ne estas bongusta?

Ĉu eble ĝi estas tro malvarma, tro varma?

–Ne.

–Kial do, vi ne povas manĝi tiun ĉi supon?

–Ĉar la kelnero ne portis al mi **kuleron**.

Ĉu la supo estis manĝebla? Kion diris la mastro? Kial la sinjoro ne povis manĝi la supon? Ĉu vi povas manĝi supon **sen kulero**?

VOCABULARIO

ALKOHOLO	<i>ALCOHOL</i>	ESPERI	<i>ESPERAR,</i>
DRINKEJO	<i>TABERNA</i>		<i>TENER</i>
FERO	<i>HIERRO</i>		<i>ESPERANZA</i>
HEROO	<i>HÉROE</i>	FLARI	<i>OLER</i>
KAMARADO	<i>CAMARADA</i>	FRITI	<i>FRITAR, FREIR</i>
KELNERO	<i>CAMARERO</i>	GUSTUMI	<i>DEGUSTAR,</i>
KULERO	<i>CUCHARA</i>		<i>PROBAR</i>
OBJEKTO	<i>OBJETO</i>	MENDI	<i>ENCARGAR,</i>
ORANĜO	<i>NARANJA</i>		<i>PEDIR</i>
RESTORACIO	<i>RESTAURANTE</i>	METI	<i>PONER</i>
TRUO	<i>AGUJERO</i>	ODORI	<i>EXHALAR UN</i>
ACIDA	<i>ÁCIDO, AGRIO</i>		<i>OLOR</i>
FIDELA	<i>FIEL</i>	SENTI	<i>SENTIR</i>
HELA	<i>CLARO (color, luz)</i>	SIGNIFI	<i>SIGNIFICAR</i>
KLARA	<i>CLARO</i>	TUŜI	<i>TOCAR</i>
	<i>comprensible)</i>	BALDAŬ	<i>PRONTO,</i>
LASTA	<i>ÚLTIMO</i>	ĈAR	<i>PORQUE (Por</i>
ADMIRI	<i>ADMIRAR</i>		<i>esa razón)</i>
ALVENI		KIAL	<i>POR QUÉ (Por</i>
(AL-VENI)	<i>LLEGAR</i>		<i>qué razón)</i>
ALPORTI		TUJ	<i>EN SEGUIDA</i>
(AL-PORTI)	<i>TRAER</i>	SALUTON	<i>YO LO SALUDO,</i>
ANONCI	<i>ANUNCIAR</i>	(= mi salutas vin	<i>LE EXPRESO</i>
ATENDI	<i>AGUARDAR</i>	= mi esprimas	<i>MI SALUDO,</i>
BEDAŬRI	<i>LAMENTAR,</i>	mian saluton)	<i>¡SALUD!</i>
	<i>DEPLORAR</i>	KIO	<i>QUÉ OCURRE?,</i>
DRINKI	<i>BEBER POR VICIO</i>	OKAZAS?	<i>QUÉ PASA?</i>

LA INSTRUISTO PAROLAS

-**AĴ** indica lo material, la cosa hecha por la materia expresada en la raíz, lo que se manifiesta concretamente: **dolĉaĵo** – *un dulce, una cosa dulce*; **sukeraĵo** – *cosa hecha con azúcar*; **legajĵo** – *material de lectura*; **skribaĵo** – *un escrito*; **trinkaĵo** – *bebida*; **fritaĵo** – *fritura*; **novaĵo** – *una nueva (noticia)*; **amikaĵo** – *una prueba de amistad, un acto amistoso*; **infanaĵo** – *una niñería, una chiquillada*. **Aĵo** – *cosa*.

-**EC** expresa *lo inmaterial, la cualidad abstracta* que a veces se expresa en castellano con palabras terminadas en *ez* o *idad* (vejez, acidez, fidelidad). **Mola** – *blando*, **moleco** – *blandura*, *molicie*; **juneco** – *juventud*; **blankeco** – *blancura*; **silkeca** – *sedoso*; **silkeco** – *sedosidad*; **homeco** – (cualidad de lo humano) **hombría**, *humanidad*, que no debe confundirse con **Homaro** – *la humanidad* (conjunto de hombres). **Eco** – *cualidad, propiedad*.

Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro – *el pecado y el error son cualidades de la humanidad*.

-**EBL** indica *posibilidad*. **Legebla** – *legible*; **nemanĝebla** – *incomible*. **Vitro estas travidebla kaj facile rompebla** – *el vidrio es transparente* (es posible ver a través) y *fácilmente rompible* (fácil de romperse). **Videbleco** – *visibilidad* (cualidad de lo que es visible). **Ebla** – *posible*, **eble** – *posiblement*,; **ebleco** – *posibilida*,: **neeble** – *imposible*. **Nekredebla novaĵo** – *una noticia increíble*.

KE es la conjunción “*que*”: **oni diras ke** – *se dice que*. **Diru al Petro ke li venu** – *dile a Pedro que venga*. **Mi vidas ke vi laboras** – *yo veo que tú trabajas*.

No confunda “*que*” conjunción con “*que*” pronombre relativo.

Creo que vendrá – **Mi kredas ke li venos**.

El señor que (el cual) *vino es Pedro* – **La sinjoro, kiu venis estas Petro**.

El libro que (el cual) *comprastre es interesante*. – **La libro, kiun vi aĉetis estas interesa**.

⇒ (Ver nota en la lección complementaria). ⇐

k.t.p. (= **kaj tiel plu**) – *etcétera* (y así lo demás).

SENUTILA es *inútil* (=no útil), **malutila** es *perjudicial*, lo contrario de útil: **senutilaj vortoj** – *palabras inútiles*; **malutilaj vortoj** – *palabras perjudiciales*. Recuerdese que **mal-** expresa lo diametralmente opuesto a lo expresado por la raíz y que los términos medios deben expresarse por **sen**, **ne**, **iom**: **riĉa-neriĉa**, **iom riĉa**, o con **-et**, **beleta** – *bonita*, **malsaneta** – *algo enfermo, decaído*.


14-a LECIONO

Ĉu vi scias kion faras tiu ĉi fraŭlino?

Ĉu ŝi manĝas ĉokoladon? Mi kredas ke ne.

Per la maldekstra mano ŝi **tenas rondan** speguleton, kaj per la dekstra ŝi tenas ruĝan krajonon. Ŝi faras gravan laboron.

Ŝi **ruĝigas** sian lipojn.




Antaŭ unu semajno ŝi estis bruna. Nun ŝi estas blonda. Do, la blondeco de ŝia hararo ne estas natura. Ŝi blondigas (heligas) sian hararon.

Ŝi beligas sin. Ŝi briligas siajn ungojn.

Ĉu vi komprenas la signifon de la sufikso “**ig**”? Ĉu vi komprenas **verdigi, blankigi, nigrigi**?

Kiu ruĝigas siajn lipojn? Ĉu vi briligas viajn ŝuojn? Ĉu vi ruĝigas vian nazon?



Li parolas kaj ŝi aŭskultas.

Li diras: “Mi amas vin”.

Ŝi nenion diras; ŝi nur ruĝiĝas.

Ŝia vizaĝo fariĝas varma kaj ruĝa.

Ĉu ŝi estas moderna fraŭlino? Mi kredas ke ne, ĉar modernaj fraŭlinoj ne ruĝiĝas.



Kia pluvego! Malfeliĉa Petro; li devas iri sub la pluvo kaj la pluvo tute **malsekigas** lin; ĝi malsekigas liajn vestojn kaj ŝuojn.

Petro tute malsekiĝis **pro** la pluvo.


La vestaĵoj de Petro estas malsekaj. La suno sekigas ilin.

Sub la varmaj sunradioj la vestaĵoj pendas kaj sekiĝas.

La ŝuojn de Petro estis malpuraj. Petro purigis siajn ŝuojn kaj briligis ilin per **broso**.

Kial Petro malsekiĝis? Kio malsekigis lin? Kio sekigas la vestaĵojn?

Ĉu vi mem purigas vian ĉambron?



La malsano maljunigis lin kaj liaj haroj griziĝis. Li iris al la montaro por resaniĝi. La montara aero estas pura kaj saniga. Manĝu multajn fruktojn kaj vi resaniĝos. La fruktoj estas nutraj kaj sanigaj. La suno maturigas ilin.

La ĉambro estas **silenta** en la mateno. Subite, je la sesa horo, la vekhorloĝo faras grandan **skandalon**, ĝi **gaje sonoras**. Petro vekigis pro la **bruo**. Li haltigas la **sonorilon** kaj rigardas la aparaton kun profunda malŝato. Li dezirus ankoraŭ resti



en la lito, **tamen** li **leviĝas**, li **ellitiĝas**. La kombilo kaj dento-broso ankoraŭ sidas apud la horloĝo, sed baldaŭ ili ankaŭ laboros.

Je kioma horo vi leviĝas (ellitiĝas)? Ĉu via patrino vekas vin? Kiom da fojoj ŝi devas veki vin? Ĉu vi tuj saltas el la lito?



Vespere je la 23-a horo, Petro senvestiĝas kaj enlitiĝas.

Li ankaŭ legas kelkajn paĝojn de interesa libro, sed baldaŭ liaj okuloj fermiĝas kaj li endormiĝas. Bonan dormon, Petro, kaj feliĉajn sonĝojn!

Petro senvestiĝas, enlitiĝas kaj endormiĝas, sed la patrino senvestigas, enlitiĝas sian infaneton kaj endormigas ĝin per kanto.

Kion faras Petro je la 23-a horo? Ĉu vi legas libron antaŭ la dormo? Je kioma horo vi enlitiĝas? Ĉu vi baldaŭ endormiĝas? Ĉu vi legas la telefonlibron?

NI PROMENU TRA LA URBO

Tra la stratoj rapidas ĉiaj veturiloj: aŭtomobiloj, **pezaj ŝarĝaŭtoj** (=kamionoj), aŭtobusoj (=omnibusoj), **tramoj**, **bicikloj**, **motor(bi)cikloj** kaj maloftaj ĉaroj kun ĉevaloj. Ĉe la **stratanguloj** policistoj **gvidas** la trafikon. Sub la stratoj, tra **tuneloj**, rapidas la subteraj **trajnoj**.

Sur la **trotuaroj** ĉe **ambaŭ flankoj** de la strato, piediras, **trotas**, kuretas la **homamaso**.

La **avenuoj** estas larĝaj, kaj ambaŭflanke **vicoj** da arboj donas ombbron al la trotuaroj.

En la urbocentro troviĝas (=sin trovas) la grandaj kaj gravaj konstruaĵoj: la **palaco** de la nacia **Registaro**, la **urbodomo**, la

bankoj, la grandaj **magazenoj** kun interesaj montrofenestroj teatroj, kinejoj, **muzeoj**, **universitato** kaj belaj, placoj kun **monumentoj**.

En mia **trankvila vilaĝo** estas nur dometoj kun ĝardeno kaj diversaj **butikoj**: **apoteko**, **panejo**, **legomvendejo**. Ĉe placeto la infanoj **ludas** kaj la maljunuloj sidas kaj babilas.

VOCABULARIO

AERO	<i>AIRE</i>	REGISTARO	<i>(EL) GOBIERNO</i>
ANGULO	<i>ÁNGULO, ESQUINA</i>	<i>(REG-IST-AR-O)</i>	<i>(conjunto de gobernantes)</i>
AMASO	<i>MULTITUD, MONTÓN</i>	SKANDALO	<i>ESCÁNDALO</i>
APOTEKO	<i>BOTICA, FARMACIA</i>	SONORILO	<i>CAMPANA</i>
AVENUE	<i>AVENIDA</i>	STRAT- ANGULO	<i>ESQUINA DE CALLE</i>
BICIKLO	<i>BICICLETA</i>	<i>(angulo de strato)</i>	TRAFIKO
BUTIKO	<i>TIENDA, NEGOCIO</i>	TRAJNO	<i>TRÁFICO</i>
BROSO	<i>CEPILLO</i>	TRAMO	<i>TREN</i>
FLANKO	<i>LADO, FLANCO</i>	TROTUARIO	<i>TRANVÍA</i>
LEGOMO	<i>LEGUMBRE</i>	TUNELO	<i>ACERA</i>
MAGAZENO	<i>NEGOCIO GRANDE</i>	VICO	<i>TÚNEL</i>
MONTRO- FENESTRO	<i>VIDRIERA, ESCAPARATE</i>	URBODOMO	<i>FILA, HILERA</i>
MONUMENTO	<i>MONUMENTO</i>	<i>(URBO-DOMO)</i>	<i>MUNICIPALIDAD, AYUNTAMIENTO</i>
MOTORCIKLO	<i>MOTOCICLETA</i>	VILAĜO	<i>(casa de la ciudad)</i>
MUZEO	<i>MUSEO</i>	KONTENTA	<i>ALDEA, VILLORRIO</i>
NACIO	<i>NACIÓN</i>	LACA	<i>CONTENTO, SATISFECHO</i>
NATURO	<i>NATURALEZA</i>	MATURA	<i>CANSADO</i>
OMBRO	<i>SOMBRA</i>	RONDA	<i>MADURO</i>
PALACO	<i>PALACIO</i>	SEKA	<i>REDONDO</i>
POLICO	<i>(LA) POLICÍA</i>	SUBITA	<i>SECO</i>
RADIO	<i>RAYO, RADIO</i>	GVIDI	<i>SÚBITO</i>
			<i>GUIAR</i>

KREDI	<i>CREER</i>
PEZI	<i>PESAR, TENER PESO</i>
RAPIDI	<i>APRESURARSE</i>
REGI	<i>REGIR, GOBERNAR</i>

ŜARĜI	<i>CARGAR</i>
TENI	<i>TENER</i>
AMBAŬ	<i>AMBOS</i>
TAMEN	<i>SIN EMBARGO</i>

LA INSTRUISTO PAROLAS

-IG tiene el sentido de *tornar, hacer, causar, poner* en el estado expresado en la raíz. Los verbos formados con **igi** corresponden a los castellanos terminados en *-ificar*: **ŝtono** = *piedra*, **ŝtonigi** = *petrificar*, **vitrigi** – *vitricificar*, **simpligi** – *simplificar*. Pero **blankigi** – *blanquear*, **nigrigi** – *ennegrecer*, **sciigi** *hacer saber*, **sekigi** – *secar*, **dormigi** – *hacer dormir, adormecer*. Todos los verbos formados con **-igi** son transitivos: exigen acusativo.

Igi usado como verbo tiene el mismo significado: *hacer, tornar, inducir*: **Mi igis lin labori** (= **mi laborigis lin**) – *yo lo hice trabajar*.

Naturalmente también se forman nombres, adjetivos y adverbios con **-ig**: **simpligo** – *simplificación*, **kuraĝiga** *que da coraje, alentador*, **kuraĝige** – *alentadoramente, en forma alentadora*.

-IĜI tiene el sentido de *hacerse, volverse, pasar a otro estado*; **ruĝiĝi** – *enrojecerse, sonrojarse*, **sekiĝi** – *secarse*, **riĉiĝi** – *enriquecerse* (*volverse rico*), **leviĝi** – *levantarse*, **kuŝiĝi** – *acostarse*, **la folioj flaviĝas, sekiĝas kaj falas** – *las hojas se vuelven amarillas, se secan y caen*.


El verbo **iĝi** tiene el mismo valor: **sekiĝi** (= **iĝi seka**), **troviĝas** – *se encuentra, hallarse*, **fariĝas** (= **iĝas**) – *se hace, se vuelve*. **Sidi** – *estar sentado*, **sidiĝi** – *sentarse, tomar asiento*.

PRO, *a causa de, por*.

Pro tio – *por eso*, **li ne venis pro la pluvo** – *él no vino a causa de la lluvia*.

AŬTO, **KINO** son apócopos: **aŭto** = **aŭtomobilo**; **Kino** = **kinematografo**. **Kinejo** es un cine, **kino** es el cine, el arte cinematográfico.

15-a LECIONO



La tablo nun estas malplena. La familio jam tagmanĝis. Post la manĝo restas **paneroj** (pecetoj da pano). La paneroj kuŝas sub la tablo. Muso kuretas sub la tablo kaj manĝas la panerojn. Ĝi kuras de unu **parto** al alia kaj manĝetas. Subite nigra kato venas. La museto tuj kuregas → sub la **sofon**. Kaj nun ĝi trankvile kuras sub la sofo, ĉar ĝia nigra malamiko tie ne povas **kapti** ĝin.

Observu!

Kie kuretis la muso por manĝi la restaĵojn?

SUB LA TABLO

Kien n kuregis la muso kiam venis la kato?

SUB → LA SOFON

La litero **n** montras ankaŭ la **direkton**, la **celon** de movo.

La kato postkuras la muson, la muso kuras □ en sian truon.

La celo de la kato estas la muso, la celo de la muso estas la truo.

Kie vi estis hieraŭ?

Mi estis hejme. Mi estis tie.

Kien vi iras hodiaŭ?

Mi iras hejmen. Mi iras tien.


Kien vi iras hodiaŭ matene?

Kien vi iros morgaŭ vespere?

Fraŭlino, ĉu vi kuras sub la sofon aŭ vi saltas sur la sofon kiam vi vidas raton?

La **muŝo** (la muŝo, ne la muso) rondflugas tra la ĉambro kaj jen ĝi falas...

–Kien? –**Ĝuste** en la **supujon!**



Kio estas en la supujo? Supo, **komprenoble**.

Kaj en la sukerujo, en la **salujo**, en la **inkujo** kio estas?

Kie vi havas la monon? Ĉu en la supujo?

En la ovujo estas centoj da ovoj, sed en la **ovingo** estas nur parto de unu ovo.

En la skatolo estas **cigaroj**. Ĝi estas ligna cigarujo.

La cigarujo **enhavas** dek cigarojn, sed la **cigaringo entenas** nur parton de unu cigaro.



La pomojn metu en → tiun malplenan ujon.

Por mia bona tranĉilo mi aĉetis ledan ingon.

Ĉu vi ŝatas la birdojn? Jen **disĵetu** tiujn panerojn por ke ili manĝu.

Dum la festo li disĵetis **plenmanon** da **moneroj** al infanoj.

Sed **antaŭ ol ni disiru** mi volas paroli al vi pri mia nova domo.

LA DOMO

Ĉu vi deziras vidi mian novan hejmon? Ĝi estas negranda domo, sed **sufiĉe komforta**.

Jen la ĝardeneto kun kelkaj **plantoj** kaj citronarbo.

Ĉi tiu estas la dormoĉambro de miaj filoj. Ĉiu havas sian **ŝrankon** por la vestaĵoj. En la banĉambro estas lavujo kaj banujo kun varma kaj malvarma akvo.

Jen la saloneto kun la piano kaj la televidaparato. Sur la **planko** kuŝas dika tapiŝo, kaj de la **plafono** pendas moderna **lambo**. Ĉe la fenestroj pendas silkaj **kurtenoj**.

Tiu ĉi **ŝtuparo** kondukas al la supra etaĝo, kie loĝas **kuracisto**. La maljuna doktoro **meritas** mian respekton kaj admiron. Li estas **respektinda** kaj admirinda persono.

Hm, bonaodoro! Ĝi venas el la kuirejo. Sur la kuirforno estas plenaj kaseroloj. En la bakforno eble estas **rostaĵo** aŭ kuko.

Ĉu vi jam foriras? Ĉu vi deziras tagmanĝi kun ni?

Ne dankon, mi bedaŭras, sed hodiaŭ ne; baldaŭ mi **revenos**. Ĝis revido!

Kio estas en mia nova hejmo?

Ĉu vi havas ĝardenon en via hejmo?

Kio estas en via dormoĉambro?

Ĉu vi povas marŝi sur la plafono?

Ĉu vi estas bona kuiristo (bona kuiristino)?

Ĉu vi ŝatas lavi kaserolojn?

Kie loĝas la maljuna doktoro? Kia homo li estas?

SENFINA RAKONTO

Malfrue en la nokto viro sidas sola sur benko de placo.

Policisto **alproksimiĝas** kaj demandas al li:

–Kion vi faras ĉi tie? Kial vi ne iras hejmen?

–Ĉar mia edzino estas **kolera**.

–Kial via edzino estas kolera?

–Ĉar mi ne iras hejmen.

Kion faris la viro?

Kiu alproksimiĝis?

Kial la viro ne iris hejmen.

Kie li sidis?

Kien li ne volas iri?

Kion faras via edzino kiam vi malfrue revenas hejmen?

Ĝis revido, amikoj!

Legu kaj relegu la lecionojn!

VOCABULARIO

CELO	<i>OBJETIVO, FIN</i>	SOFO	<i>SOFÁ</i>
CIGARO	<i>CIGARRO</i>	ŜTUPO	<i>ESCALÓN</i>
EDZO	<i>ESPOSO</i>	ŜTUPARO	<i>ESCALETA</i>
INKO	<i>TINTA</i>	ŜRANKO	<i>ARMARIO</i>
FORNO	<i>COCINA,</i> <i>HORNILLO de cocina</i>	TAPIŜO	<i>TAPIZ,</i> <i>ALFOMBRA</i>
KASEROLO	<i>CACEROLA</i>	ĜUSTA	<i>JUSTO, EXACTO</i>
KURTENO	<i>CORTINA</i>	SUFIĈA	<i>SUFICIENTE</i>
MUSO	<i>RATÓN,</i> <i>LAUCHA</i>	APERI	<i>APARECER</i>
MUŜO	<i>MOSCA</i>	CELI	<i>TENDER A</i>
PLAFONO	<i>TECHO</i>	KAPTI	<i>ATRAPAR</i>
PLANKO	<i>PISO (suelo) DE</i> <i>HABITACIÓN</i>	KOLERI	<i>ENCOLERIZARSE</i>
PLANTO	<i>PLANTA</i>	KUIRI	<i>COCINAR</i>
RESPEKTO	<i>RESPETO</i>	KURACI	<i>CURAR, TRATAR</i> <i>ENFERMOS</i>
SALO	<i>SAL</i>	MERITI	<i>MERECER</i>
		ROSTI	<i>ASAR</i>

LA INSTRUISTO PAROLAS

ACUSATIVO DE DIRECCIÓN. Del mismo modo que en “*Juan corre (persigue) a Pedro*”, Pedro representa el fin, el objetivo de la acción, en “*Juan corre a Montevideo*”, Montevideo representa también el fin de la acción, de un movimiento.

Así diremos en Esperanto: **Johano postkuras Petron y Johano kuras Montevideon.**

Este acusativo de dirección es muy útil, porque nos permite distinguir el movimiento con traslación del movimiento sin traslación:

La hundo kuras en la ĝardeno – *el perro corre en el jardín* (estando dentro de él). **La hundo kuras en la ĝardenon** (entra corriendo en el jardín desde afuera). **La muso kuretas sub la tablo** – *el ratón corretea bajo la mesa*. **De sub la tablo la muso kuras sub la sofon** – *de debajo de la mesa el ratón corre* (hacia) *debajo del sofá*.

KIE – *donde*, **kien** – *adonde*, **tie** – *alla*, **allí**, **tien** – *hacia allá*.

El adverbio de lugar puede tomar la **n** del acusativo de dirección: **hejme** – *en casa*, **hejmen** – *a casa*, **supre** – *arriba*, **supren** – *hacia arriba*, **antaŭe** – *adelante*, **antaŭen** – *hacia adelante*. **Ĉiam antaŭen!** – *Siempre adelante!*

-**UJ** da la idea general de *recipiente*, de *continente*: **supujo** – *sopera*, **monujo** – *billettera*, **monerujo** – *monedero*. **Laktujo estas ujo por lakto** – *lechera es un recipiente para leche*.

(Ver nota en la lección complementaria).

DIS- es prefijo que denota *dispersión*: **disdoni** – *distribuir* (dar a varios), **dismeti** – *distribuir* (colocar en varios lugares), **disiri** – *separarse* (ir en varias direcciones), **disiĝi** – *separarse*, **disigi** – *separar*. **La vojoj disiĝas** – *los caminos se separan*. **Miaj aĵoj dise kuŝis sur la planko** – *mis cosas yacían desparramadas sobre el piso*.

RE- señala la *repetición*: **relegi** – *releer*, **refari** – *rehacer*, **reveni** – *volver*, **redoni** – *devolver* (volver a dar). **Ĝis (la) revido!** – *hasta la vista!* (hasta volvernos a ver).

-**ING** señala lo que contiene parcialmente algo: **ovingo** – *huevera*, **cigaringo** – *boquilla* (para cigarrillos), **kandelingo** – *candelerero*. **Kandelingo estas ingo por kandelo** – *Ingo da idea de vaina*. **Sabringo** – *vaina de sable*.

-**IND** denota lo que es digno, que merece: **Fidinda** – *fidedigno*, *fehaciente*. **Vidinda pejzaĝo** – *un paisaje digno de verse*, **leginda libro** – *un libro que merece ser leído*, **respektinda** – *respetable*, **ridinda** – *ridículo*. **Respektinda persono estas persono inda je respekto**. **Indeco** – *dignidad*.

-**ER** Este sufijo señala la *partícula*, el *elemento constitutivo*: **sablo** – *arena*, **sablero** – *grano de arena*, **fajro** – *fuego*, **fajrero** – *chispa*, **monero** – *moneda* (níquel), **panero** – *migaja*. **Panero estas ero da pano**. **Diserigi** – *desmenuzar*.

SEN – *sin*: **sen pano kaj sen mono** – *sin pan y sin dinero*. “**Pli**

bona pano sen butero ol kuko sen libero” – *más vale* (mejor) *pan sin manteca* (pan seco), *que tortas sin libertad*.

También esta preposición se usa como prefijo: **sengusta supo** – *sopa insípida*, **vesto de senmakula blankeco** – *vestido de blancura inmaculada* (**makulo** – *mancha*). **Senhoma vilaĝo** – *aldea deshabitada* (sin hombres).

Algunas expresiones:

Kompreneble (comprensiblemente) se usa como nuestro coloquial “*naturalmente*” o “*se comprende*”.

Plenmano es *un puñado* (una mano llena). **Plenkulero** – *una cucharada*, **plenbuŝo** – *una bocanada, un bocado*.

Por ke ili manĝu – *para que ellos coman*.

Antaŭ ol ni disiru – *antes que nos separemos*.

Enhavi – *contener*.

Enteni – *contener asiendo, sujetando el contenido* (**Teni** – *tener, asir*; **havi** – *poseer*).

16-a LECIONO

–Diru al mi, sinjoro; ĉu **vi** estas la instruisto?

–Ne, sinjoro, mi estas **lernanto**.

–Jes, vi estas persono kiu lernas, vi estas **lernanto**.

Antaŭ tri monatoj vi diris: “Mi lernos Esperanton”, tiam vi estis **lernonto**.

Kaj post du aŭ tri monatoj vi diros: “Mi lernis Esperanton”, tiam vi estos **lerninto**.

Ni ankaŭ povas diri: vi estas **lernanta homo**, vi estis **lernonta homo**, vi estos **lerninta homo**.

Tiel la persono kiu **prezidas** estas la prezidanto, la persono kiu amas estas amanto.

–Pardonu, sinjoro, sed ankoraŭ mi ne tute klare komprenas...

–La **participoj** ne estas malfacilaj.

Bonvolu, observi la jenajn ekzemplojn:

Petro estas homo tre **akurata**. Li ĉion faras en la ĝusta momento. Ĉiutage je la kvina horo, Petro trinkas tason da teo. Ni iru ĝis la kafejo, kie Petro **kutimas** trinki sian teon kaj observu.


Estas kvin antaŭ la kvina.

Sur la tablo estas taso kun kulereto, tekruĉo kaj sukero.

La teo estas en la tekruĉo (=teujo).


Petro trinkas la teon.

Petro ESTAS TRINKONTA la teon.



Estas ĝuste la kvina.
La teo estas en la taso. Petro trinkas ĝin.

Petro ESTAS TRINKANTA la teon.



Jam estas dek kvin post la kvina.
La taso estas malplena. Petro jam trinkis la teon.

Petro ESTAS TRINKINTA la teon.

Se morgaŭ ni denove observos Pe-
tron en la kafejo ni vidos, ke je la kvara
kaj kvindek kvin.

Li ESTOS TRINKONTA la teon.

Je la kvina

Li ESTOS TRINKANTA la teon.

Je la kvina kaj dek kvin

Li ESTOS TRINKINTA la teon.



Sed hieraŭ mi ankaŭ estis en tiu kafejo kaj vidis, ke kvin
minutoj antaŭ la kvina

Petro ESTIS TRINKONTA la teon.

Je la kvina

Petro ESTIS TRINKANTA la teon.

Je la kvina kaj dek kvin

Petro ESTIS TRINKINTA la teon.

Petro trinkas la teon kaj la teo estas trinkata.

Hieraŭ je la kvara kaj kvindek kvin

La teo ESTIS TRINKOTA de Petro.

Je la kvina

La teo ESTIS TRINKATA de Petro.

Je la kvina kaj dek kvin
La teo ESTIS TRINKITA de Petro.

Nun je la kvara kaj kvindek kvin
La teo ESTAS TRINKOTA de Petro.

Je la kvina
La teo ESTAS TRINKATA de Petro.

Je la kvina kaj dek kvin
La teo ESTAS TRINKITA de Petro.

Kaj morgaŭ je la kvara kaj kvindek kvin
La teo ESTOS TRINKOTA de Petro.

Ĝuste je la kvina
La teo ESTOS TRINKATA de Petro.

Je la kvina kaj dek kvin
La teo ESTOS TRINKITA de Petro.

La trinkota teo estas ankoraŭ en la teujo.

La trinkata teo estas en la taso.

La trinkita teo ne plu estas en la taso; ĝi estas en la stomako de Petro (la trinkinto).

Ĉu je la 5-a Petro estas trinkinta la teon?

Ĉu je la 6-a la teo estas ankoraŭ trinkota de Petro?

El kio estas farita via jako?

El kio estas faritaj viaj ŝuoj?

Lernonto aĉetas lernolibron.

Lernanto uzas lernolibron.

Lerninto metas la lernolibron en la bibliotekon kaj portas sur la brusto la verdan stelon.

Amonto rigardas la fraŭlinojn, esperas.

Amanto razas sin ĉiutage, skribas **parfumitajn** leterojn, vidas ĉion **rozkolora**.

Aminto ĵetas leterojn klaj **portreton** en la fajron.

LERNANTO RAKONTAS...

Hieraŭ mi estis sidanta antaŭ mia skribotablo. Mi jam estis lerninta la 15-an lecionon de mia lernolibro kaj estis skribanta **leteron** al mia frato, kiam Petro eniris en la ĉambron.

–Kiel vi fartas? –li diris. La vetero estas agrabla. Ĉu vi volas promeni kun mi tra la parko?

–Jes, kial ne? La leteron mi skribos vespere –mi respondis.

Mi surmetis mian jakon kaj ni foriris kune.

Dum ni estis marŝantaj sur la strato li klarigis al mi la **koncerton**, kiun ni estis aŭskultontaj. Tiu koncerto jam estis **ludita** en la pasinta dimanĉo, sed pro la **sukceso** ĝi estos ripetata (reludata) hodiaŭ.

En la parko ni vidis la statuon de Mendoza, la **fondinto** de Buenos Aires.

En aliaj urboj estas monumentoj al Zamenhof, la **kreinto** de Esperanto.

Multaj promenantoj **ĝuis** la belan veteron.

En la koncertejo jam multaj ĉeestantoj sidis. La ludontaj muzikistoj estis jam kun siaj instrumentoj.

Dum la koncerto la aŭskultantoj silentis.

Kiam ni revenis hejmen la suno estis malaperanta ĉe la horizonto.

Kaj, ĉu mi diru al vi sekreton? La leteron, kiun mi estis skribonta al mia frato mi ne skribis; ĝi estas ankoraŭ skribota.

Kion mi estis faranta, kiam venis Petro?

Kion diris Petro dum ni estis marŝantaj?

Kien ni iris? Kion ni vidis tie?

Kiu estis Mendoza? Kiu estis Zamenhof?

Kiuj sidis en la koncertejo?

Kion faras la aŭskultantoj?

Nun vi povas kompreni la signifon de la vorto Esperanto.

D-ro Zamenhof ne subskribis sian unuan libron per sia nomo, sed per **pseŭdonomo** “D-ro Esperanto”, **t.e.** (tio estas), la doktoro kiu esperas, kiu havas esperon.

VOCABULARIO

EKZEMPLO	<i>EJEMPLO</i>	PREZIDI	<i>PRESIDIR</i>
KONCERTO	<i>CONCIERTO</i>	SUKCESI	<i>TENER ÉXITO</i>
LETERO	<i>CARTA</i>	KLARIGI	<i>ACLARAR, EXPLICAR</i>
PARFUMO	<i>PERFUME</i>	T.E. (=TIO	<i>ESTO ES, ES DECIR</i>
PORTRETO	<i>RETRATO</i>	ESTAS)	
AKURATA	<i>PUNTUAL</i>	BONVOLU	<i>TENGA UD. A BIEN, HAGA UD. EL BIEN, POR FAVOR</i>
FONDI	<i>FUNDAR</i>	MI PETAS	<i>LE RUEGO, POR FAVOR</i>
KUTIMI	<i>TENER LA COSTUMBRE</i>		
KREI	<i>CREAR</i>		
PETI	<i>PEDIR, ROGAR</i>		

LA INSTRUISTO PAROLAS

PARTICIPIO ACTIVO: -ANTA, -INTA, -ONTA. En castellano el participio (“participa” del verbo y del adjetivo) es un adjetivo. En Esperanto, el participio podrá ser adjetivo, sustantivo o adverbio. Pero a pesar de ser mayores en Esperanto las posibilidades del participio, éste es mucho más simple que en cualquier lengua nacional.

El modo que sigue sirve para todos los verbos:

Mi parolas – *Yo hablo*

Mi parolis – *Yo hablé*

Mi parolos – *Yo hablaré*

Mi estas parolanta – *Yo estoy hablando*

Mi estis parolanta – *Yo estaba hablando*

Mi estos parolanta – *Yo estaré hablando*

Mi estas parolinta – *Yo he hablado*

Mi estis parolinta – *Yo había hablado*

Mi estos parolinta – *Yo habré hablado*

En castellano usamos las formas compuestas a menudo sin verdadera necesidad: *¿Qué está haciendo Ud.?* en lugar del simple: *¿Qué hace Ud.?* En Esperanto preguntamos **Kion vi faras?** Y no **Kion vi estas faranta?**, es decir, que no se usarán las formas compuestas más que cuando sea necesario; cuando sea preciso relacionar dos hechos en el tiempo.

Compare: *Cuando yo entré él estaba comiendo*
Cuando yo entré él estaba por comer
Cuando yo entré él había comido

Kiam mi eniris li estis manĝanta
Kiam mi eniris li estis manĝonta
Kiam mi eniris li estis manĝinta

Lo mismo es para los otros tiempos: *Yo cantaré mañana* – **Mi kantos morgaŭ.** *Yo estaré cantando cuando entre Pedro* – **Mi estos kantanta kiam Petro eniros.**

El participio sustantivo también puede usarse en los distintos tiempos: La frase “*Él es el constructor*” puede ser, según los casos:

Li estas la konstruanto – *el que construye*
Li estas la konstruinto – *el que construyó*
Li estas la konstruonto – *el que construirá*

Saluton. Cezaro, la mortontoj vin salutas.

PARTICIPIO PASIVO: -ATA, -ITA, -OTA.

Es el que indica que una persona o cosa sufre pasivamente la acción del verbo: *carta escrita, pan comido, hombre castigado.*

En Esperanto el participio pasivo se forma con las terminaciones **-ata, -ita, -ota**.

La domo estas { **konstruata** – *la casa es (está siendo) construida*
konstruita – *la casa ha sido construida*
konstruota – *la casa está por ser construida*

La domo estis { **konstruata** – *la casa era construida*
konstruita – *la casa había sido construida*
konstruota – *la casa estaba por ser construida*

La domo estos { **konstruata** – *la casa será construida*
konstruita – *la casa habrá sido construida*
konstruota – *la casa estará por ser construida*

Nótese que los participios pasivos se usan en Esperanto con una mayor precisión que en cualquier lengua nacional:

Konstruota domo es *una casa por construirse (-ota)*, de la cual tenemos solo los planos. **Konstruata domo**, es *una casa que se está construyendo (-ata)*, y **Konstruita domo**, es *una casa ya construida, terminada (-ita)*. **Domo konstruata el brikoj** es *una casa que se está construyendo con ladrillos*. **Domo konstruita el brikoj** es *una casa (ya) construida con ladrillos*.

Y con esto ya hemos visto las 12 formas del verbo con que el Esperanto reemplaza con ventaja las miles de formas que el Español necesita.

17-a LECIONO

Vi jam konas la historion: “Petro amas Marian kaj Maria amas Petron”.

Ili amas **unu la alian**.

Ili amas **sin reciproke**.

Petro iris ĉe **juvelisto** kaj aĉetis du **orajn** ringojn (= ringoj el oro), kaj Petro fariĝis **fianĉo** kaj Maria fariĝis fianĉino. Ili **gefianĉiĝis** (ge = li + ŝi).

La gefianĉoj estas **strangaj** homoj kaj ili agas strange. La fianĉoj iras ĉiam elegante vestitaj kaj **zorge** kombitaj kaj razitaj, kaj faras multajn **donacojn** al sia fianĉino –florojn, bombonojn, juvelojn– kaj ofte **invitas** ŝin al kinejo aŭ teatro. Kaj ĝuste tion ankaŭ faras Petro.

Bedaŭrinde ofte ankaŭ venas la patrino aŭ la frateto de Maria. La patrino malŝatas la plenajn aŭtobusojn kaj preferas veturi per taksioj (= taksiaŭtoj) kaj la frateto ĉiam elektas la plej karajn **glaciaĵojn**.

Matria ankaŭ faras donacojn al Petro. Ŝi faras stranga-kolorajn kravatojn por sia amato. Sed ili estas feliĉaj kaj ŝatas promeni kun la mano en la mano sub la luno, aŭ **prefere** sen luno...



En unu bela tago Petro kaj Maria staris antaŭ la **pastro** kaj fariĝis **edzo** kaj **edzino**. Ili fariĝis geedzoj (= geedziĝis).

La patrino de Maria estas nun la **bo**patrino de Petro, kaj la kara frateto nun fariĝis la **bo**frato de Petro.

Post kelke da tempo la **cikonio** faris viziton al la hejmo de Petro. Nun la gepatroj de Petro kaj Maria fariĝis **avoj**, ĉar ili havas novan **nepon**. Kaj la frato de Petro nun estas **onklo**. La juna Petreto estas lia **nevo**. Kaj la filoj de la frato de Petro estas kontentaj, ĉar ili ricevis tute novan **kuzon**.

Ho, la familio!



Sed ne nur la homoj geedziĝas, ankaŭ la bestoj tion faras. La koko havas multajn edzinojn. Sed ĝi estas feliĉa, ĉar ili jam estas vestitaj de la naturo mem.

La filojn de la koko ni nomas la **kokidoj**.

Juna ĉevalo estas ĉevalido. La rondetaĵ rozkoloraj **idoj** de la porko estas la porkidoj.

Vi memoras ke mi estis skribonta leteron al mia frato kiam envenis Petro.

La leteron mi skribis kaj **sendis** en la posta tago.

La skribitan leteron mi metis en **koverton** (=mi enkovertigis), skribis la **adreson**, **gluis** la **poŝtmarkojn** sur la koverton kaj fermis la koverton.

Mi iris al la poŝtoŝticejo (= poŝtejo) kaj metis la leteron en la **leterkeston** (=mi enpoŝtigis la leteron). Kaj nun mi atendas la respondon.

Leterportisto disportas la leterojn.

- Kion mi faris per la skribita letero?
- Ĉu vi ŝatas ricevi leterojn de viaj amikoj?
- Ĉu vi akurate respondas?
- Ĉu vi kolektas poŝtmarkojn?
- Ĉu vi estas filatelisto?

2-AKTA DRAMO – kun epilogo –

1-a akto

S-ro direktoro sidas sur komforta seĝo antaŭ sia skribotablo. En la ĉambro estas nur unu seĝo, tamen la **ĉarma**, blonda oficistino ankaŭ sidas kaj skribas.

La direktoro estas feliĉa.



2-a akto

La adzino de la direktoro eniras. Ŝi estas nek ĉarma nek blonda; ŝi estas furioza.

La fraŭlino ne **plu** sidas.

La direktoro ne **plu** estas feliĉa.



Epilogo - laŭ via plaĉo.

Kio okazos poste, morgaŭ?

Morgaŭ la edzino batos la edzon.

Morgaŭ la direktoro **maldungos** la oficistinon. (Ĉu tio estus **justa?**).

Morgaŭ la sinjoro aĉetos belan juvelon por la edzino.

Kiu fino estas ĝusta, laŭ via opinio?

Ĉu vi havas fantazion?

Ĉu plaĉis la vi la dramo?

Kion vi **estus farinta** en simila okazo?

Ĉu vi estus forkurinta?

Verku alian epilogon.

VOCABULARIO

ADRESO	<i>DIRECCIÓN, DOMICILIO</i>	POŜTMARKO	<i>SELLO DE CORREO</i>
AKTO	<i>ACTO (TEATRAL)</i>	RINGO	<i>ANILLO</i>
AVO	<i>ABUELO</i>	ĈARMA	<i>ENCANTADOR</i>
CIKONIO	<i>CIGÜEÑA</i>	JUSTA	<i>JUSTO</i>
EDZO	<i>ESPOSO</i>	RECIPROKA	<i>RECÍPROCO</i>
FIANĈO	<i>NOVIO</i>	SIMILA	<i>SIMILAR</i>
GLACIO	<i>HIELO</i>	STRANGA	<i>EXTRAÑO, NO COMÚN</i>
GLACIAĴO	<i>HELADO (Cosa hecha con hielo)</i>	APOGI	<i>APOYAR</i>
GLUO	<i>COLA DE PEGAR</i>	DONACI	<i>REGALAR, DONAR</i>
JUVELO	<i>JOYA</i>	DUNGI	<i>EMPLEAR</i>
KESTO	<i>CAJA, CAJÓN</i>	MALDUNGI	<i>DESPEDIR</i>
KOVERTO	<i>SOBRE</i>	ELEKTI	<i>ELEGIR</i>
KUZO	<i>PRIMO</i>	INVITI	<i>INVITAR</i>
LETER- KESTO	<i>BUZÓN (Caja para cartas)</i>	KOLEKTI	<i>COLECCIONAR REUNIR</i>
NEPO	<i>NIETO</i>	PREFERI	<i>PREFERIR</i>
NEVO	<i>SOBRINO</i>	SENDI	<i>ENVIAR</i>
ONKLO	<i>TÍO</i>	KION VI	
ORO	<i>ORO</i>	ESTUS	<i>¿QUÉ HABRÍA</i>
PASTRO	<i>SACERDOTE</i>	FARINTA?	<i>HECHO UD.?</i>
POŜTO	<i>CORREO</i>		

LA INSTRUISTO PAROLAS

ILI AMAS UNU LA ALIAN = ILI AMAS SIN RECIPROKE.

Cuando la acción es recíproca o mutua se usan estas formas.

El sentido de “*él se hirió*” es claro, pero “*ellos se hirieron*” puede significar que cada uno de ellos se hirió (en un accidente), o que se hirieron entre sí, recíprocamente (en un combate).

Para evitar esta ambigüedad es que diremos en Esperanto: **ili sin vundis en akcidento** (= *ĉiu el ili sin vundis – cada uno de ellos se hirió*) y **ili sin vundis reciproke** o **ili vundis unu la alian** – *se hirieron mutuamente*.

Sólo como licencia poética podrá encontrarse: **La dentoj mordas la langon, tamen ambaŭ sin amas** – *los dientes muerden la lengua, y sin embargo se aman.*

GE- este prefijo tiene la virtud de *reunir a los dos sexos*: **miaj gepatroj** – *mis padres* (= mi padre y mi madre), **lernejo por geinfanoj** (= **geinfana lernejo**) – *escuela mixta* (para niños y niñas), **ili geedziĝis** – *ellos se casaron* (se hicieron esposo y esposa).

BO- este prefijo indica *el parentesco político*, resultante del matrimonio – **Bopatrino** – *suegra*, **bofilo** – *yerno*, **bofrato** – *cuñado*, **boparencoj** – *parientes políticos*.

-ID es sufijo que señala *el descendiente*, el cachorro, el pichón: **koko** – *gallo*, **kokido** – *pollo*, **porkido** – *lechón*, **Izraelido** – *israelita* (descendiente de Israel). **Ido** es *hijo, descendiente*. **Johano loĝas tie kun sia vasta idaro** – *Juan vive allí con su vasta prole.*

LAŬ – *según, conforme con*: **agu laŭ via plaĉo** – *obré según su gusto*. **Laŭ mia horloĝo estas la oka** – *según mi reloj son las ocho*. **Mi marŝis laŭlonge de la fervojo** – *yo caminé a lo largo del ferrocarril*, **laŭlarĝe** – *a lo ancho*.

PLU – *más* – con sentido de duración en tiempo o espacio: **mi ne laboras plu** – *yo no trabajo más*, **kion plu vi scias?** – *¿qué más sabe?* **Trinku unu pluan taseton** – *beba una tacita más*. **Kaj tiel plu** (= **ktp**) – *y así más* (= etcétera).

ŜATI – **PLAĈI**. Ya conocemos bien el verbo **ŝati**. Es verbo transitivo y señala nuestro gusto personal, subjetivo. **Tiu domo estas plaĉa sed mi ne ŝatas ĝin** – *esa casa es agradable* (= placentera) *pero a mi no me gusta*.

PLAĈI es verbo intransitivo y significa *agradar*, ser agradable por su cualidad placentera: **tio plaĉas al mi** – *eso me gusta* (me agrada). **Plaĉa muziko** – *música placentera*. **Kiel plaĉas al vi la ĝardeno?** – *¿Cómo encuentra el jardín?*

VERKI es *componer o escribir obras literarias, musicales, etc.*: **verki libron** – *escribir* (componer) *un libro*, **verkisto** – *un*

escritor, teatra verko – obra teatral. Leteron mi skribas, sed rakonton mi verkas.

ZORGI es *cuidar de algo, preocuparse por algo: ne zorgu pri mi! – no se preocupe por mi! Pli zorgas unu patrino pri dek infanoj ol dek infanoj pri unu patrino – cuida más una madre de diez hijos (niños) que diez hijos de una madre. Zorge farita – cuidadosamente hecho. Senzorga – descuidado, despreocupado.*

AGI es *obrar, actuar: agi juste – obrar justamente (con justicia), justa ago – acción justa. Zorgu pri viaj agoj! – ¡Cuidado con lo que hace!*

ORACIÓN PASIVA. Podemos usar también nuestro conocimiento de los participios para verificar si un verbo debe o no ser seguido por el acusativo.

Sea la oración:

Petro manĝas panon – *Pedro come pan.*

Si la oración puede ser vuelta por pasiva, será transitiva, irá seguida de **-n**.

La pano estas manĝata de Petro – *El pan es comido por Pedro.*

Probemos con: **Petro kuŝas sur la lito** – *Pedro yace sobre la cama.*

Vemos que si tratamos de ponerla en forma pasiva, la oración pierde su sentido. Se trata, pues, de una oración intransitiva.

La pano estas manĝata de Petro. Vemos que después de la forma pasiva usamos **de** para designar al agente, al que hace: **Esperanto estas lingvo kreita de Zamenhof** (*kreita* porque está ya creada, terminada de crear).

Roŝkolora es *color de rosa*. Y del mismo modo se forma **violkolora** – *color violeta*, **oranĝkolora** – *color anaranjado*, **citronflava** – *amarillo limón*.

Ludi es *jugar (ludilo – juguete)*. Pero lo mismo que en inglés y francés, este verbo significa, además, *interpretar un papel teatral* – **ludi teatran rolon**, y *tocar un instrumento* – **ludi pianon**.

18-a LECIONO

Vojaĝante (=dum oni vojaĝas) oni lernas. Tio estas vera, ĉar vojaĝinte en Bolivio mi multon lernis.

Dum mia restado en tiu lando pluvis kaj pluvadis dum du semajnoj, kaj dum la tuta tempo mi legadis en mia ĉambro. Ho, mi multon lernis!



Nur ĝenis min la daŭra **martelado** de iu **forĝisto**, loĝanta apude. Sed ne nur mi legis en tiu hotelo, mi ankaŭ **amu-ziĝis**, ĉar tie estis sufiĉe da musoj.

Kiam mia kuzino ekvidas (=subite vidas) muson ŝi ektimas (subite timas), eksaltas kaj esploras –Kaj mi ekridas.

Ĉu vi parolas dormante?

Ĉu vi ŝatas longajn paroladojn?

Kion vi faras dum longa pluvado?

Ĉu vi facile ekridas aŭ esploras?

BIFSTEKO KUN FUNGOJ

S-ro Smith estas anglo. Ĉu vi cias kio estas anglo?


–Jes, mi scias; anglo estas sinjoro kiu **fumas pipon**, legas la Biblion, kaj ne ŝatas lerni fremdajn lingvojn.

S-ro Smith, do, estis vojaĝema. Tial ke (=ĉar) en Londono la vetero estas malagrabla dum la vintro, nia amiko per aeroplano (=aviadilo) veturis suden, al la sunplena Valencio, en **Hispanujo**. Li gaje promenadis tra la urbo, admirante la oranĝarbojn kaj la belajn brunulinojn, sed ekvidinte restoracion li eksentis apetiton.

“Por festi tiun ĉi belan tagon mi mendos mian preferatan manĝon: bifstekon kun fungoj”, diris S-ro Smith. Li eniris la

restoracion, sidis ĉe tablo kaj **vokis** la kelneron. S-ro Smith tuj mendis –anglalingve (=en la angla lingvo), kompreneble– bifstekon kun fungoj. La kelnero ridetis, sed ne komprenis. Tiam S-ro Smith ekhavis brilan ideon. Li prenis paperon kaj krajonon kaj **desegn**is sian mendon tiel:

La kelnero prenis la papereton kaj foriris. Farinte sian mendon S-ro Smith observis la manĝejon. Blanka tablotuko kovris la tablon. Sur ĝi estis **telero**, **forko**, kulero, tranĉilo, buŝtuko, **glaso**, vinbotelo, **kruĉo** kun akvo kaj **pankorbo**. La tuta manĝ-ilaro estis pura.



Ĉe la apuda tablo sidis tri manĝantoj. Unu manĝis **viandrostajon** kun **terpomoj** kaj **legomoj**, la dua manĝis **bakitan kokidon** kun salato, la tria jam estis manĝanta la **deserton**: kukojn kaj fruktojn. Laŭ la aspekto ili **ŝajnis fremduloj**.

Sed nia anglo jam estis perdanta sian **paciencon** (=li jam senpacienĉgis), tiam, post 20 minutoj, fine revenis la kelnero. Ĉu li alportis la deziratan manĝaĵon? –Tute ne! **Anstataŭ** tio, en unu mano li portis **pluvombrelon** kaj en la alia enirbileton por la **taŭrobatalo!**

S-ro Smith ne lasis **trinkmonon** por la kelnero...

Kie loĝis S-ro Smith? Kien li veturis?
 Kial li forveturis? Ĉu li veturis bicikle?
 Kion li admiris? Kion li tre ŝatis?
 Ĉu vi fumas pipon?
 Ĉu S-ro Smith parolis hispane? Kion li faris?
 Ĉu la desegno estas komprenebla?
 Kio estis sur la manĝotablo?

Ĉu la kelnero tuj revenis?
Kion li alportis **anstataŭ** la menditan manĝaĵon?
Ĉu S-ro Smith estis feliĉa?
Kion vi estus farinta en simila okazo?

La filo de Petro ankaŭ nomiĝas (=estas nomita) Petro, sed la gepatroj nomas lin **Peĉjo**. La nomo de la filino estas Sofia, sed la gepatroj nomas ŝin **Sonja**. Kaj Peĉjo kaj Sonja nomas sian patron **paĉjo**, kaj sian patrinon **panjo**.

Ĉu ankaŭ oni nomas vin per karesa nomo –“Pepe”, “Paco”, “Maruja”?

La patro de Maria estas la avo de la eta Petro, sed la avo de Maria, kio estas?

–Li estas la **praavo** (=patro de la avo) de eta Petro (=Peĉjo) kaj Peĉjo estas lia **pranepo**.

La unuaj homoj sur al tero estis niaj prapatroj aŭ prauloj. Ili vivis en la pratempo. En Ameriko estas ankaŭ grandaj ne bone konataj praarbaroj.

Ĉu vi havas vivantan praavon?
Ĉu niaj prapatroj estis pli feliĉaj ol ni?
Ĉu niaj pranepoj estos pli **saĝaj** (= prudentaj, inteligentaj), ol ni?

Karlo invitis min ĉeesti festeton ĉe li. Mi demandis lin: “Je kioma horo mi devas esti ĉe vi, kaj kiel mi devas vesti min”?

Li respondis: “Vi povas veni **kiam ajn** (=en kiu ajn momento), vesti kiel ajn. Ĉe mi vi povas fari kion ajn kaj babili kun kiu ajn.”

Vivu la libero!

Ĉu vi aŭskultas kian ajn programon en la radio?
Ĉu vi parolas kun kiu ajn sur la strato?

LA KORVO KAJ LA VULPO

Jen la fama **fablo** de fama verkisto. Ni rerakontas ĝin ne **versoforme**, sed en simpla **prozo**.

S-ro Korvo sidis sur **branĉo** tenante en sia **beko** bonodoran **fromaĝon**.

S-ro Vulpo tre malsata **vagadis** tra la arbaro kaj ekflaris la odoron de la fromaĝo. Ekvidinte la korvon kun la fromaĝo, la vulpo volis ĝin manĝi, sed ĝi estis tro alta. Sed S-ro Vulpo estas **ruza** kaj li **flate** ekparolis al la korvo: “Sinjoro Korvo, kiel bela vi estas! Kiel brila estas via plumaro! Se via voĉo estus tiel bela kiel via plumaro vi estus la reĝo de l’ arbaro! Kantu, sinjoro korvo, kantu por ke mi aŭdu vian belan voĉon!”



Aŭdinte tion, la korvo, kiu estis kredema kaj **vantema**, malfermis sian bekon por kanti kaj la bongusta fromaĝo falis en la buŝegon de sinjoro Vulpo.

“Dankon, diris S-ro Vulpo, kaj estonte ne fidu la flatantojn. Ĉi leciono tamen, valoras fromaĝon”.

“Ju pli oni vivas, des pli oni lernas” –**grumblis** la korvo.

Kie vagadis la vulpo?

Ĉu la korvo havis la fromaĝon en la poŝo?

Kia birdo estas la korvo?

Ĉu la korvo bele kantas?

Kia estas la vulpo?

Kial la korvo malfermis la bekon?

Ĉu la korvo agis saĝe?

VOCABULARIO

BRANĈO	<i>RAMA</i>	TERPOMO	<i>PAPA, PATATA</i>
DESERTO	<i>POSTRE</i>	TELERO	<i>PLATO</i>
FORKO	<i>TENEDOR</i>	TRINKMONO	
FROMAĜO	<i>QUESO</i>	(= MONO POR TRINKI)	<i>PROPINA</i>
FREMDULO	<i>FORASTERO</i>	VULPO	<i>ZORRO</i>
FUMO	<i>HUMO</i>	FREMDA	<i>EXTRANJERO,</i> <i>EXTRAÑO</i>
FUNGO	<i>HONGO</i>	MALSAĜA	<i>INSENSATO,</i> <i>LOCO</i>
KORBO	<i>CESTA</i>	RUZA	<i>ASTUTO</i>
KORVO	<i>CUERVO</i>	SAĜA	<i>JUICIOSO,</i> <i>SENSATO,</i> <i>SABIO</i>
KRUĈO	<i>JARRA</i>	VANTA	<i>VANIDOSO</i>
MARTELO	<i>MARTILLO</i>	AMUZI	<i>DIVERTIR</i>
PACIENCO	<i>PACIENCIA</i>	DAŬRI	<i>DURAR</i>
PIPO	<i>PIPA</i>	DESEJNI	<i>DIBUJAR</i>
PLUV-		FLATI	<i>ADULAR</i>
OMBRELO	<i>PARAGUAS</i>	FORĜI	<i>FORJAR</i>
REĜO	<i>REY</i>	GRUMBLI	<i>GRUÑIR</i>
SAĜECO	<i>SABIDURÍA,</i> <i>BUEN SENTIDO</i>	ĜENI	<i>MOLESTAR</i>
SAĜULO	<i>UN HOMBRE</i>	KARESI	<i>ACARICIAR</i>
SALATO	<i>SABIO, SENSATO</i>	KRII	<i>GRITAR</i>
SUN-		VAGI	<i>VAGAR</i>
OMBRELO	<i>SOMBRILLA</i>	VOKI	<i>LLAMAR</i>
TAŬRO-	<i>CORRIDA DE</i>		
BATALO	<i>TOROS</i>		

LA INSTRUISTO PAROLAS

-ANTE, -INTE, -ONTE. Los participios adverbios corresponden al gerundio español, que termina en *-ando, -endo* o *-iendo*.

El participio adverbio no se usa en tiempos compuestos.

Manĝonte mi eniris restoracion – *habiendo de comer entré en un restaurante*, **manĝante mi legis la ĵurnalon** – *comiendo leí el diario*, **manĝinte mi pagis kaj foriris** – *habiendo (ya) comido, pagué y me marché*.

La forma pasiva (-ate, -ite, -ote) es de uso menos frecuente.

Li vizitis min neatendite – *él me visitó inesperadamente. Estis skribite* – *estaba escrito.*

KIEL AJN es de cualquier modo, **kiu ajn** – cualquiera, **kiam ajn** – en cualquier momento, **io ajn** – cualquier cosa, **kie ajn** – en cualquier parte, **ktp.** La partícula **ajn** “indefini”.

-AD expresa ► la acción...: **krono** – corona, **kronado** – coronación; ► ... acción continuada: **pafo** – tiro, **paŝado** – tiroteado; ► ... nombre de acción: **uzi** – usar, **uzado** – el uso, **naĝado** – natación, **kantado** – el canto.

EK- señala comienzo de acción o acción breve: **vidi** – ver, **ekvidi** – percibir, **ekmarŝi** – echar a andar.

PRA- es prefijo que señala lo primitivo, el parentesco distante en el tiempo: **pratempo** – tiempos primitivos, **praulo**, **prapatro** – antepasado, **praavo** – bisabuelo, **pranepo** – bisnieto. **Praa** – primitivo.

-ĈJ, -NJ son sufijos con los que se forman los diminutivos cariñosos, masculinos y femeninos, respectivamente y se colocan detrás de las primeras letras del nombre, abreviándolo: **patro** – padre, **paĉjo** – papá, **panjo** – mamá, mamita, **Jozefo** – José, **Joĉjo** – Pepe.

Este es el único caso en que se altera una raíz en Esperanto (**panjo**). Porque el uso de nombres íntimos y cariñosos es voluntario y escapa a toda regla.

En la literatura de Esperanto se encontrarán los mismos nombres femeninos con terminación “a” u “o”: **Sofia** = **Sofio**, **Sonja** = **Sonjo**.

JU PLI, DES PLI es cuanto más, tanto más: **ju pli da suno**, **des pli da sano** – cuanto más sol, más salud, **ju pli oni vivas**, **des pli oni lernas** – cuanto más se vive, más se aprende.

DE L’. En Esperanto puede suprimirse la “a” final del artículo después de preposición terminada en vocal, o antes de palabra que comience en vocal: **de l’ amo** (= **de la amo**). Pero esta elisión sólo se usará en poesía o, muy excepcionalmente, en prosa.

19-a LECIONO

NI VETURAS AL ESPERANTO-KONGRESO

Veturonte al Kongreso, Petro kaj Maria **renkontas** Karlon antaŭ la fervoja stacidomo.

Petro –Rapidu, samideano, vi marŝas **kvazaŭ** vi havus multe da tempo!

Karlo –Pardonu, sed mi ne kulpas. **Kvankam** mi dormis nur du horojn mi frue leviĝis kaj devis **adiaŭi** (=diri adiaŭ) miajn parencojn.

P. –Ĉu vi estas sola? **Krom** vi, ĉu neniu alia samideano venas?

K. –Krom mi ankaŭ venis Antono kaj Rodolfo. Ĵus ili iris al la **informejo**. Jam ili parolas kun la staciestro. Krome, Julio diris al mi hieraŭ, ke **bedaŭrinde** li ne venos, ĉar li estas malsana. La **plimulto** veturas per aŭtobusoj.

P. –Venu, Maria, jen nia vagono. Ni envagoniĝu. Per nia bileto ni **rajtas** kunporti nur negrandan **valizon** kaj **pakajon**.

M. –**Ĝustatempe** (=en la ĝusta tempo) ni alvenis. La **lokomotivo fajfas** kaj la trajno (=vagonaro) ekmoviĝas.

K. –Ĉu vi scias, ke la lokomotivo estas tre demandema?

P. –Ĉu...?

K. –Jes, ĝi ĉiam diras “ĉu, ĉu, ĉu...”

P. –Hm... tre **sprita** vi estas hodiaŭ. Sed ĝi povas ankaŭ esti dubema.

K. –Tion mi ne bone komprenas.

P. –Krom montri demandon, la vorteto **ĉu** ankaŭ montras dubon: “Mi dubas ĉu li venos”, “mi ne scias ĉu vi komprenas”.

- K. –Dankon pro la informo, sed rigardu! ni jam veturas **ekster** la **ĉefurbo**. Vidu nun tiun “popolon” kun blankaj dometoj...
- P. –Ne diru “hispanaĵojn”; tio estas vilaĝo; la popolo estas la loĝantaro. La esperanta popolo loĝas dise tra la vasta mondo. Mi vidas, ke ankaŭ vi faras erarojn, Karlo. Dum la veturo ni povas iom **praktiki** la lingvon.
- M. –Vi **pravas**, ni praktiku! ni **nepre** devas paroli en flua kaj korekta Esperanto. Anstataŭ babili ni lernu. En mia **not-libro** estas kelkaj notoj kaj gramatikaĵoj, kiujn mi ne tute bone komprenas, **malgraŭ** tio, ke mi lernis ilin.
- P. –Ni vidu viajn notojn. Komprenoble, vi lernis la lingvon, sed ne **ellernis** (=finlernis) ĝin.
- K. –Do, bonvolu klarigi al mi la signifon de la sufikso **op**.
- P. –Mi klarigos per **ekzemploj**: “Sur la mallarĝa vojeto ni devis marŝi **unuope**” (=unu post unu). “Kiam ni venis al la lago la **moskitoj** milope sin **ĵetis** sur nin”. Vidu tie, super la kamparo, la aeroplanoj flugas trioje.
- M. –Klarigu, mi petas, la prepozicion **po**.
- P. –“Tiu ĉi libro konsistas el dudek lecionoj; se vi lernus **po** unu leciono ĉiutage, post dudek tagoj vi estus **tralerninta** la tutan kurson”. “Mi aĉetis dekduon da oranĝoj, kaj al ĉiu el la ses infanoj mi donis **po** du oranĝoj”.
- K. –Dankon, Petro, mi bone **profitas** la vojaĝon. Sed ni devas ankaŭ **ĝui** la rapide **preterpasantan** pejzaĝon. La **moŝta** suno jam alte brilas **super** la kamparo.
- M. –Rigardu tiun viron sidanta **kontraŭ** ni. Li trinkas ion el botelo.
- P. –Li ne trinkas, sed drinkas: rigardu nur lian **nazaĉon!** Fi!

Kia homo!, mi ne drinkas: mi estas kontraŭalkoholisto.

- K. –Se vi jam uzis la sufikson **-aĉ** kaj la prefikson **fi-**, bonvolu klarigi la **diferencon** inter ambaŭ.
- P. –Ĉu vi komprenas la vortojn **libraĉo**, **popolaĉo**? Rigardu tra la fenestro tiun malbelan, malpuran domon; ĝi estas domaĉo. Ĝi estas fizike malbona. Alia domo estas tre bonaspekta, sed la **moralo** de ĝiaj loĝantoj ne estas tre pura; vere ĝi estas **fidomo**. **Fiulo** estas senmorala persono, morale malbona (= **fripono**).
- K. –Nun mi komprenas. Sed kie estas Antono kaj Rodolfo? Mi iros **serĉi** ilin.

Demandoj

- Kial la samideanoj veturas?
Kial Karlo malfruiĝis?
Kiuj venis krom Petro kaj Karlo?
Per kio ili veturas? Kien ili iras?
Ĉu vi ofte veturas per trajno? Ĉu vi ŝatas veturi sen bileto?
Kion diris Antono?
Kion li faras anstataŭ babili?
Ĉu Karlo estas perfekta esperantisto?
Se vi estus lerninta Esperanton antaŭ dek jaroj, kia esperantisto vi estus nun?
Ĉu vi vizitos Kongreson de Esperanto?
Ĉu vi legos esperantan literaturon?
Ĉu vi trinkas kiun ajn vinaĉon?
Ĉu vi, fraŭlino, vizitas drinkejojn?
Ĉu vi ankaŭ praktikadas Esperanton kun viaj amikoj?
Ĉu vi loĝas en la ĉefurbo?
Ĉu vi ŝatus flue paroli en Esperanto?
Kio fluas sub la ponto?
Kiujn volas serĉi Karlo?

VOCABULARIO

ĈEFO	<i>JEFE</i>	INFORMI	<i>INFORMAR</i>
ĈEFURBO	<i>CIUDAD, CAPITAL</i>	ĴETI	<i>ARROJAR</i>
EKZEMPLO	<i>EJEMPLO</i>	PAKI	<i>ENPAQUETAR</i>
LOKOMO- TIVO	<i>LOCOMOTORA</i>	RENKONTI	<i>ENCONTRAR (A alguien)</i>
NOTO	<i>NOTA</i>	SERĈI	<i>BUSCAR</i>
PAKAĴO	<i>PAQUETE</i>	ADIAŬI	<i>DECIR ADIOS, DESPEDIRSE</i>
PONTO	<i>PUENTE</i>	ANSTATAŬI	<i>REEEMPLAZAR</i>
PLIMULTO	<i>MAYORÍA</i>	PLENUMI	<i>CUMPLIR</i>
PRAKTIKO	<i>PRÁCTICA</i>	BEDAŬRINDE	<i>LAMENTABLE- MENTE</i>
RAJTO	<i>DERECHO</i>	ADIAŬ	<i>ADIOS</i>
STACIO	<i>ESTACIÓN</i>	AMBAŬ	<i>AMBOS</i>
STACI- DOMO	<i>EDIFICIO DE LA ESTACIÓN</i>	ANSTATAŬ	<i>EN LUGAR DE</i>
TASKO	<i>TAREA</i>	MALGRAŬ	<i>A PESAR DE, MALGRADO</i>
VAGONO	<i>VAGÓN</i>	PLENUMI	<i>CUMPLIR CON</i>
VALIZO	<i>VALIJA, MALETA</i>	SIAN DEVON	<i>SU DEBER</i>
NEPRA	<i>INDISPENSABLE, INELUDIBLE</i>	VI PRAVAS	<i>TIENE UD. RAZÓN</i>
PRAVA	<i>QUE TIENE RAZÓN</i>	ĈU MI RAJTAS?	<i>¿PUEDO? ¿TENGO DERECHO?</i>
SPRITA	<i>INGENIOSO, CHISTOSO</i>	NEPRE IRU	<i>VAYA SIN FALTA</i>
DIFERENCI	<i>DIFERENCIAR</i>	NEPRA	<i>DEBER</i>
DUBI	<i>DUDAR</i>	DEVO	<i>INELUDIBLE</i>
FAJFI	<i>SILBAR</i>		
FLUI	<i>FLUIR</i>		
ĜUI	<i>GOZAR</i>		

LA INSTRUISTO PAROLAS

-OP forma los numerales colectivos: **la aviadiloj flugis triope** – los aviones volaban en grupos de tres.

PO es una preposición que indica *a razón de, a tanto por*: **mi marŝas po ses kilometroj hore** – *yo camino a razón de seis kilómetros por hora.*

Se usa también como prefijo: **vendi pogrande** – *vender por mayor*, **podetale** – *al detalle*, **pogute** – *a gotas, por gotas.*

-**Ĉ** es sufijo con significado *despectivo*: **libraĉo** – *libraco*, **popolaĉo** – *populacho*. **La ebrulo aĉe insultis lin** – *el ebrio lo insultó soezmente*. **Aĉa vorto** – *palabra grosera, soez.*

FI- es prefijo con significado también *despectivo*, pero refiriéndose al aspecto *moral*: **fihomo** = **fiulo** – *canalla*, **fiagoj** – *acciones canallescás*. Usado como interjección, **FI** denota desagrado. **Fi!** – *Puf!*

KROM – *aparte de*: **krom tio** – *aparte de eso*; **krom Pedro** (**ankaŭ**) **venis Karlo** – *además de Pedro (también) vino Carlos*; **Krom Petro neniu venis** – *a excepción de Pedro no vino nadie*. **Krome** (= **plie**) – *además*. **Krompago** – *pago extra*.

KVAZAŬ – *como si, a guisa de*: **li min rigardis kvazaŭ li ne konus min** – *él me miró como si no me conociese*. **Li demandis kvazaŭ li estus fremdulo** – *él preguntó como si fuese un extraño*. **Li uzis ŝtonon kvazaŭ martelon** – *él usó una piedra a guisa de martillo*.

-**ESTR** denota *autoridad*: **staciestro** – *jefe de estación*, **urbestro** – *intendente, alcalde*, **laborestro** – *capataz*. **Estro** (= **ĉefo**) – *jefe*. **La estraro de la Kongreso** – *las autoridades del Congreso*.

DU HOROJN. Para señalar complementos circunstanciales, especialmente los que expresan medida (tiempo, peso, precio, dirección), se puede –siempre que la claridad no se vea afectada– reemplazar la preposición respectiva por la terminación “**n**”:

Mi dormis dum du horoj.

Mi dormis du horojn.

La monto estas alta je 1000 metroj.

La monto estas 1000 metrojn alta.

La fecha podrá escribirse: **en la 16-a de Septiembre, je la 16-a de Septiembre** o **la 16-an de Septiembre**. Las tres formas son correctas, pero la última es la más empleada.

MOȘTO es *título de cortesía en general*: **reğa moșto** – *majestad real*, **moșta suno** – *su alteza, su majestad el sol*, **la prezidanta moșto** – *su excelencia el presidente*. **Moștulo** – *un personajón*.

ELLERNI (= **FINLERNI**) es *aprender a fondo, terminar de aprender*. **EI**, usado como prefijo, significa además de la idea de salida (**eliri**), la acción terminada (como si la cosa terminada se saliera del material). **Ellabori** – *elaborar*, **eluzi** – *usar hasta el fin*, **eluzita pantalono** – *pantalón totalmente gastado*.

20-a LECIONO

(Daŭrigo de la 19-a)

Revenas Karlo, akompanata de Antono kaj Rodolfo.

- A. –Bonan tagon kamaradoj. Pardonu, ke ni ne tuj venis al vi, sed okazis ke ni iris en la manĝovagonon por matenmanĝi kaj tie ni trovis **eksprofesoron** nian. Li invitis nin sidi ĉe sia tablo. Ni mendis kafon, sed la kelnero **mis-komprenis** nin kaj portis al ni teon. Kion fari en tia kazo? Ĉu protesti, ĉu trinki la teon? Ni trinkis la teon.

*Vidante nian stelon, la profesoro demandis kion ĝi signifas. Mi klarigis al li la simbolo de nia **insigno** kaj donis al li informilon pri Esperanto, kiujn mi ĉiam kunportas en la poŝo. Traleginte ĝin li diris: “Jen interesege afero kaj **lernenda** lingvo. Mi certe ĉeestos kurson kaj eble mi iros kun kelkaj **kolegoj**”.*

- M. –Post tia klarigo vi estas pardonita... Sed rigardu tiujn du sinjorojn, tie, dekstre, kiel multajn gestojn ili faras dum ili parolas...

P. –Ili estas **surdmutuloj**, tial ili multe gestas parolante.

M. –Ĉu tio estas ia religio?

P. –Ne, Maria, ne; surdmutulo estas homo surda kaj muta. Surda estas persono kiu ne povas aŭdi kaj persono kiu ne povas paroli estas muta. Al tiuj homoj **mankas sentumo**. Ankaŭ al **blindulo** mankas sentumo, mankas al li vidkapablo.


- R. –Rigardu, rigardu! mi trovis poŝtranĉilon apud la benko. **KIES** ĝi estas? (= al kiu ĝi apartenas?)

Ĉu al neniu? Do la persono, kies poŝtranĉilon mi trovis, ne troviĝas ĉi tie.

Mi pensas ke per tiu ĉi poŝtranĉilo oni povus bone klarigi la uzadon de al sufikso **um**.

K. –Ĉu jes...?

R. –Vidu tiun ĉi poŝtranĉilon. Ĝi havas diversajn ilojn; segilon, borilon, **korkotirilon**, **fajlilon**, tondilon. Ĝi **taŭgas** por diversaj laboretoj, sed vere ĝi estas nek tondilo, nek segilo, nek fajlilo, nek borilo.



La sufikso **-um** iel similas tiajn multuzajn ilojn. Oni uzas ĝin kiam oni ne trovas la ĝustan afikson.

P. –Oni povas diri ankaŭ, ke la sufikso **-um** similas tiujn ĉionfarantajn laboristojn, kiuj faras kiajn ajn laborojn, sed ne havas difinitan **metion**. Per la sufikso **-um** oni **amindumas**, **aerumas**, **gustumas**...

A. –Per similaj vortoj oni povus ankaŭ klarigi la uzon de la prepozicio **je**, kiu ne havas difinitan **sencon**. Ĝi montras ĉefe mezuron: “je la tria”, “je kelke da paŝoj”...

K. –Ne plu “gramatikumu”, mi petas. Ni rigardu la pejzaĝon. Vidu la riĉan kamparon. Antaŭ unu **jarcento** nur maloftaj **gaŭĉoj** rajdis tra tiuj verdaj **dezertoj**. Nun ĉie **kreskas greno**, kaj **plimultiĝas brutaro** (bovoj, ŝafoj, ĉevaloj, k. s.).

M. –Rigardu tien, jen **ĵusnaskita** bovido (bovino ĵus naskis ĝin) apud sia patrino. Tie aro da **ŝafoj blekas** ĉirkaŭ akvujo. Ili estas **sojfaj**. Ili volas trinki.

P. –La ŝafoj estas **stultaj** kaj malbonodoras... prefere ni aŭskultu anekdoton. Antono, ĉu vi ne havas ion novan por rakonti?

A. –Kial ne? Aŭskultu tiun ĉi:

SENMON KAJ BONHAV

Sinjoro Senmon renkontas la dikan sinjoron Bonhav sur la strato, kaj sinjoro Senmon demandas tre ĝentile: “Ĉu vi povas diri al mi kioma horo estas?” Sinjoro Bonhav **suspekteme** rigardas la demandinton kaj respondas:

“Vi vere ne deziras scii pri la horo; tio estas nur preteksto por ekparoli kun mi; kaj se ni interparolas ni fariĝos amikoj, kaj se ni fariĝos amikoj (=ni amikiĝos) vi vizitos mian hejmon, kaj se vi vizitos mian hejmon tie vi vidos mian filinon Leonora kaj se vi vidos mian filinon vi enamiĝos je ŝi, kaj se vi enamiĝos je ŝi vi petos ŝian manon kaj... Ĉu vi opinias ke mi donos la manon de mia filino al iu sentaŭgulo, kiu **eĉ** horloĝon ne havas!”

P. –Bona anekdoto, Antono, kaj tre **lerte** vi ĝin rakontis. Nun estas via vico, Karlo.

K. –Mi ankoraŭ ne tre flue parolas...

R. –Mia avo diradis: “Nur forĝante oni fariĝas forĝisto”. Do, nur parolante oni lernas paroli...

K. –Mi **provos**:

LA FREMDULO KAJ LA VILAĜA BUBO

Fremdulo piedirante al la urbo renkontas **bubon** sur la vojo kaj demandas lin. “Aŭdu, knabo, kien iras tiu ĉi vojo?”

B. –Ĝi iras nenien.

F. –Sed en la vilaĝo oni diris al mi, ke mi **sekvu** ĝin por **atingi** la urbon.

- B. –Ho jes, ili pravis.
- F. –Do kial vi diras ke ĝi iras nenien?
- B. –Jes sinjoro, ĝi iras nenien; ĝi kuŝas tie senmove.
- F. –Bone, bone; mi vidas, ke vi estas **lerta**. Kiel vi nomas vin?
- B. –Neniel.
- F. –Ĉu vi ne havas nomon?
- B. –Jes, sinjoro, sed mi ne nomas min; aliaj personoj nomas min.
- F. –Bone, kiel via patrino nomas vin?
- B. –Nu, tio **dependas**. Kelkfoje ŝi diras al mi “mia kara anĝelo”, **alifoje** ŝi nomas min “malpura porko”... Nu, laŭ la vetero...
- F. –(**Fulmotondro!** Estas neeble ion scii pri tiu ĉi bubaĉo!) Diru al mi, knabo, ĉu via familio estas granda?
- B. –Vidu, **proksimume** tiel granda kiel tiu de la onklo Peĉjo.
- F. –(Ruza diableto) Kiom da personoj estas en via familio?
- B. –Ho jes, tiu demando estas pli klara. Ni estas tiom da personoj kiom da teleroj Panjo metas sur la manĝo-tablon.
- F. –Kaj kiom da teleroj Panjo metas sur al tablon?
- B. –Unu por ĉiu persono...
- F. –!!!!!!...
- B. –Ĉu vi deziras scii ion pli?”

R. –Sed tio estas tre malnova popolrakonto, Karlo... Mi rakontos al vi ion tute novan. Mi rakontos sonĝon, kiun mi

sonĝis nur hieraŭ:

“Mi troviĝis en stelforma dounluma ĉambrego. Viro aperis kaj diris: “Montru vian **invitilon!**” “Mi ne ricevis”, mi respondis. “Do, venu antaŭ la juĝisto”, rediris la viro, kaj kondukis min en angulon de la ĉambro, kie sidis kelkaj longbarbaj sinjoroj. Iu el ili, kiu tre similis al esperanta instruisto, kiu ekzamenis min, demandis per timiga voĉo:

–Kiu estas vi? –Mi estas Rodolfo.

–Kio estas vi? –Mi estas studento.

–Kia estas vi? –Mi estas juna kaj sana.

–Kie vi loĝas? –En Bonaero.

–Kien vi iras? –Al Esperanto-Kongreso.

–Kiam ĝi okazos? –La venontan semajnon.

–Kiom da homoj iros? –Ĉirkaŭ 500.

–Kiel vi iros? –Per trajno.

–Kial vi ne iras piede? –Ĉar miaj piedoj protestos.

–Kies poŝtranĉilon vi trovis? –Ne... nenies.

–Vi mensogas, la poŝtranĉilo ies devas esti –ekkriis la juĝisto. Gardisto, faru truon en lian kapon kaj enmetu en ĝin ĉiujn “ies-vortojn”. La gardisto elpoŝigis grandan borilon (mi volis forkuri, sed ne povis) kaj ekpikis mian kapon.

*Forta **frapo** sur mian kapon vekis min, kaj mi aŭdis la voĉon de mia patrino, kiu diris: “Leviĝu Rodolĉjo, aŭ vi malfruiĝos. Rigardu kian moskiton mi mortigis sur via kapo”.*

M. –Sed, Rodolfo, ĉu vi ne diris ke vi ĵus trovis la poŝtranĉilon?

R. –Jes, sed vi scias ke ofte dum sonĝoj ni antaŭvidas la okazontaĵojn.

A. –Mi volus “antaŭvidi” programon de la Kongreso.

P. –Jen la mia:

ESPERANTO-KONGRESO

– PROGRAMO –

Malfermo de la Kongreso
en la Universitato

Laborkunsidoj
en Urba Biblioteko

Teatra Prezento

Supera Ekzameno

Bankedo
en restoracio
“LA ORA ROSTAĴO”

Ekskursoj
per ŝipeto kaj aŭtobuso

Balo

K. – Bona programo, estas serioza laboro kaj **amuzo**.

P. – Samideanoj, ni baldaŭ atingos nian celon. **Verŝajne** kelkaj samideanoj estas jam en la stacidomo por akcepti nin. Ni pretigu niajn valizojn. Karlo, malfermu la fenestron por montri nian verdan **flageton**.

M. – Jam ni envenas la stacidomon. Jen ili estas, niaj karaj samideanoj.

Saluton!

La atendantaj samideanoj kun ĝoja vizaĝo ekkrias.

BONVENON, AMIKOJ!

VOCABULARIO

BRUTO	<i>BRUTO, GANADO</i>	VERŠAJNA (VER-ŠAJNA)	<i>VEROSÍMIL</i>
BUBO	<i>PILLETE, "PIBE"</i>	AKCEPTI	<i>ACEPTAR, RECIBIR</i>
FLAGO	<i>BANDERA</i>	AMUZI	<i>DIVERTIR</i>
FULMO	<i>RAYO</i>	ATINGI	<i>ALCANZAR</i>
FULMO- TONDRO	<i>TORMENTA ELÉCTRICA, Aquí usada como interjección: ¡RAYOS Y TRUENOS!</i>	BORI	<i>PERFORAR</i>
GAŮÇO	<i>GAUCHO</i>	ČEESTI	<i>ESTAR PRESENTE, ASISTIR</i>
GRENO	<i>GRANO, CEREAL</i>	FAJLI	<i>LIMAR</i>
HAŮTO	<i>PIEL</i>	FUKCII	<i>FUNCIONAR</i>
KAZO	<i>CASO</i>	KRESKI	<i>CRECER</i>
KORKO	<i>CORCHO</i>	MANKI	<i>FALTAR</i>
METIO	<i>OFICIO</i>	PLIMULTIĜI	<i>AUMENTAR, MULTIPLICARSE</i>
NEGRO	<i>(UN) NEGRO</i>	RAJDI	<i>CABALGAR</i>
SENCO	<i>SENTIDO (Acepción)</i>	SEKVI	<i>SEGUIR</i>
SENSO	<i>SENTIDO (Facultad)</i>	SOJFI	<i>TENER SED</i>
(= SENTUMO)	<i>SENTIDO (Facultad)</i>	SUSPEKTI	<i>SOSPECHAR</i>
SENTAŮGULO	<i>UN INÚTIL, UN INEPTO</i>	TAŮGI	<i>SERVIR, SER APTO</i>
ŠAFO	<i>CARNERO</i>	TIRI	<i>TIRAR, HACER TRACCIÓN</i>
TONDRO	<i>TRUENO</i>	IES	<i>DE ALGUIEN</i>
BLINDA	<i>CIEGO</i>	KIES	<i>CUYO, DE QUIEN</i>
CERTA	<i>CIERTO, SEGURO</i>	NENIES	<i>DE NADIE</i>
ĴUSNASKITA	<i>RECIÉN NACIDO</i>	ALIFOJE	<i>OTRA VEZ</i>
LERTA	<i>HÁBIL</i>	VERŠAJNE	<i>AL PARECER (VEROSÍMIL- MENTE)</i>
MUTA	<i>MUDO</i>	ESTAS VIA	
STULTA	<i>ESTÚPIDO, ESTULTO</i>	VICO	<i>ES TU TURNO</i>
SURDA	<i>SORDO</i>		

LA INSTRUISTO PAROLAS

-UM. Este sufijo no tiene sentido propio, y se lo usa para derivar palabras cuya relación a la raíz es imprecisa y no puede expresarse por otro afijo. Las palabras formadas con **-um** deben aprenderse como palabras-raíces.

Amindumi – *cortejar*, **cerbumi** (**cerbo** – *cerebro*) – *cavilar*, **foliumi** – *hojear*, **gustum** – *degustar*, **kolumo** – *cuello* (de camisa o blusa), **krucumi** – *crucificar*, **proksimume** – *aproximadamente*, **k.t.p.**

EKS- indica *que fue*, ex: **eksministro** – *exministro*, **eksigi** – *destituir* (convertir a alguien en “ex”), **eksiĝi** – *dimitir* (hacerse “ex”).

MIS- señala *lo erróneo, lo inconveniente*: **miskompreni** – *comprender mal*, **misedziĝo** – *casamiento equivocado, inconveniente*.

-END este sufijo significa *que debe ser*: **farenda tasko** – *tarea que debe ser hecha*, **riparenda vojo** – *un camino que debe ser reparado*, **sekvenda ekzemplo** – *ejemplo que debe seguirse*.

EĈ, *aún, hasta, mismo*: **eĉ sur la suno troviĝas makuloj** – *hasta en el sol se encuentran manchas*. **Mi estis tiel okupita, ke mi eĉ ne manĝis** – *yo estaba tan ocupado que ni siquiera comí*. **Eĉ ne** – *ni aún, ni siquiera*. **Eĉ infano faras tion** – *hasta un niño lo hace*.

Ĵusnaskita es *recién nacido, recién dado a luz*. **Naski** en Esperanto es verbo transitivo, significa *dar a luz*. *Nacer* es **naskiĝi**. **La bovino naskis bovidon** – *la vaca tuvo un ternero*. **Mi naskiĝis en Ameriko** – *yo nací en América*.


LECCIÓN COMPLEMENTARIA

LA TERMINACIÓN **N** tiene tres empleos distintos:

1° Señala el complemento directo del verbo transitivo.

1-a. **Ĝi montras la rektan komplementon de transitiva verbo.**

Petro batas Paŭlon



2° Señala el fin de un movimiento.

2-a **Ĝi montras la celon de movo.**



Iru tien. Li falis teren.

Después de preposición que indica movimiento (**al, ĝis**) no irá **n**.

3° Reemplaza una preposición.

3-a **Ĝi anstataŭas prepozicion.**

Li laboris du horojn (= dum du horoj).

Petro alvenis ĵaŭdon (= je ĵaŭdo).



La domo estas 30 metrojn larĝa (= je 30 metroj larĝa).

Siempre que la claridad no se vea afectada, podrá reemplazarse una preposición por la **n** final. Después de preposición no va acusativo.

En estos ejemplos están empleados los tres oficios de la terminación **n**: **Petro iris en la ĉambron, malfermis la fenestron kaj kvin minutojn li rigardis. Petro ĵetis la ŝtonon kontraŭ la pordon kaj malproksimiĝis kelkajn metrojn.**

EL ARTÍCULO. El objeto del artículo es aclarar el sentido de la oración, impidiendo que se confunda la cosa a que nos referimos con otra semejante. Por lo tanto, podemos dejar de usar esta palabra cuando no aclara una idea. Será pues correcto decir: **Leono estas besto. Rozo estas floro. Lakto estas pli nutra ol vino.**

En español decimos “*vive en el Perú*”, “*vive en Chile*”; en Esperanto: **Li loĝas en Peruo, li loĝas en Ĉilo.** No se usará pues, el artículo delante de nombre propio – que no necesita determinación.

Cuando un nombre propio va precedido de un título, como **sinjoro, doktoro, generalo**, no lleva artículo: **Profesoro Martínez estas malsana. D-ro Zamenhof estis kuracisto.**

CI. En Esperanto, como en inglés, no existe prácticamente el tuteo. No obstante, si se siente la absoluta necesidad de esta forma íntima, se puede emplear el pronombre **ci** – *tú*: **Mi cin amas** – *Yo te amo.*

PRONOMBRE REFLEXIVO. Al emplear el reflexivo **sia**, recuerde que:

- a) el adjetivo **sia** nunca va delante del sujeto;
- b) **sia** precede al objeto (complemento) poseído por el sujeto:
Juan (sujeto) juega con su perro (perteneciente al sujeto) – Johano ludas kun sia hundo.
Juan (sujeto) y su perro (sujeto) juegan – Johano kaj lia hundo ludas.

Compárense los siguientes ejemplos: **La sinjoro ordonis al sia servisto vesti lin** – *El señor ordenó a su sirviente vestirlo* (que lo vistiera). **La sinjoro ordonis al sia servisto vesti sin** – *El señor ordenó a su sirviente vestirse* (que se vistiera).

En Esperanto, como en castellano, las palabras **iu, tiu, ĉiu, kiu, neniu** –*alguien, ese, quien, etc.*– pertenecen gramaticalmente a la tercera persona, aunque se refieran a la primera o segunda: **Ĉiu el ni ricevos sian porcion** – *cada uno de nosotros recibirá su porción*. **Neniu el vi evitos sian sorton** – *ninguno de vosotros evitará su suerte* (destino). **Tiu el vi, kiu opinias sin kapabla** – *aquel de vosotros que se considere capaz*.

El sujeto puede no ser explícito: **Esti en sia elemento** – *estar en su elemento*. **Timi sian propran ombron** – *temer su propia sombra*.

ORACION DIRECTA. Si alguien nos dijo ayer “yo iré mañana” y nosotros lo repetimos, podremos escoger entre la forma directa: “*él me dijo: yo iré mañana*”, y la forma indirecta: “*él dijo que iría mañana*”. En Esperanto usamos en la oración indirecta la forma lógica que se hubiera empleado en la oración directa:

él dijo: “iré mañana”.

li diris: “mi iros morgaŭ”.

él dijo: “yo soy brasileño”.

li diris: “mi estas brazilano”

él dijo que iría mañana

li diris ke li iros morgaŭ.

él dijo que él era brasileño

li diris ke li estas brazilano

-UJO da la idea general de *continente*, de *recipiente*. De ahí las formas **supujo** (que contiene sopa), **pomujo** (que contiene manzanas), **italujo** (que contiene italianos). Por consiguiente la palabra **kafujo** podría significar: caja para café, cafetera, planta de café o país del café. Pero, recordemos que en todos los idiomas las palabras reciben su significado exacto por el contexto. No obstante eso, podremos

siempre en Esperanto contar con recursos para construir la palabra precisa que nos haga falta. Así tendremos: **kafskatolo** – *caja para café*. **Kafkruĉo** – *vasija para café, cafetera*, **kafarbo** – *árbol de café, cafeto*, y **kaflando** – *país del café*.

LOS NOMBRES DE LOS PAÍSES del antiguo continente se forman agregando el sufijo **uj** o la palabra **lando** al nombre del pueblo que le dio origen: **Germano**, **Germanujo** (= país de los germanos): **Dano**, **Danujo** (= país de los daneses).

En el nuevo continente, por el contrario, el habitante recibe el nombre del país que habita: **Peruo**, **peruano**; **Brazilo**, **brazilano**.

Pero también encontraremos en nuestras lecturas, la terminación **io** para formar nombres de países: **Italio**, **Francio**, **Rusio**. **Meksikanoj loĝas en Meksiko**. **Francoj loĝas en Francujo**, **Franclando aŭ Francio**.

ADJETIVO ATRIBUTIVO. Compare estas dos frases: *“Juan encontró a su bella novia”* y *“Juan encontró bella a su novia”*. En el primer caso, la cualidad *“bella”* es permanente en la novia, y lo es para todo el mundo; en el segundo, Juan encuentra que su novia es bella, le atribuye esa cualidad, aunque quizá no la posea. El Esperanto distingue la cualidad permanente (epíteto) de la circunstancial (atributo) de este modo:

Johano trovis sian belan fianĉinon.

Johano trovis sian fianĉinon bela.

Note que en el segundo caso, **bela** va sin **-n** final.

Mi vidis la fermitan pordon – *Vi la puerta cerrada* (no la abierta).

Mi vidis la pordon fermita – *Vi (que) la puerta (estaba) cerrada*.

Que también puede decirse: **Mi vidis ke la pordo estis fermita**.

QUE. Cuando “*que*” puede reemplazarse por *el, la, lo, los, las cuales* (pronombre relativo) se traduce por **kiu, kiuj**, según los casos.

Los libros que (los cuales) ves sobre la mesa son del señor que (el cual) está de pie.

La libroj, kiujn vi vidas sur la tablo estas de la sinjoro, kiu staras.

Recuérdese, además, que “*que*”, cuando es pronombre relativo va detrás del nombre que reemplaza, en tanto que “*que*” conjunción sigue generalmente al verbo.

Mi vidas, ke la libroj, kiujn vi aĉetis estas interesaj.

Veo que los libros que (los cuales) Ud. compró son interesantes.

Cuando “*que*” reemplaza a “*qué cosa*” se pone **kio**.

¿Qué (cosa) haces? – Kion vi faras?

¿De qué (cosa) se trata? – Pri kio temas?

Si “*que*” significa *cuán, cuánto*, en frases admirativas, se traduce por **kia**.

¡Qué (cuánto) calor! – Kia varmo!

¿Qué (cuán) hermoso día! – Kia bela tago!

El “*que*” de *más que, menos que*, es **ol: pli ol, malpli ol**.

Y en los demás casos (conjunción), “*que*” se traduce por **ke**:

Mi deziras, ke vi lernu – Deseo que aprendas.

Mi kredas, ke li venos – Creo que él vendrá.

Oni diras ke... – Se dice que...

Mi laboras por ke li ripozu – Trabajo para que él repose.

PARTICPIO ADVERBIO. “*Vi a Pedro caminando por la calle*” puede significar: “*yo, caminando por la calle, vi a Pedro*”, o bien “*yo vi a Pedro que caminaba por la calle*”.

En Esperanto diremos en el primer caso: **Marŝante sur la strato mi vidis Petron** y, en el segundo: **Mi vidis Petron**

marŝanta sur la strato. En el primer caso empleamos el participio adverbial porque deseamos indicar cómo el sujeto hace algo (*¿cómo?* – caminando = cuando el sujeto caminaba).

Se usa, pues, el participio adverbial (activo o pasivo y en cualquiera de los 3 tiempos) cuando éste se refiere al sujeto de la proposición, en los demás casos, conservará su forma adjetiva.

DE es la preposición más usada en Esperanto y en español. Damos aquí algunos ejemplos en que su uso difiere en las dos lenguas. En Esperanto el uso de **de** es más preciso que en español:

<i>Una taza de té</i>	Taso da teo
<i>Una taza de porcelana</i>	Taso el porcelano
<i>Una taza de María</i>	Taso de Maria
<i>Una mesa hecha de pino</i>	Tablo farita el pino
<i>Una mesa hecha por Juan</i>	Tablo farita de Johano
<i>El primero de todos</i>	La unua el ĉiuj
<i>¿De qué se trata?</i>	Pri kio temas?
<i>Se trata de lo siguiente</i>	Temas pri la jeno
<i>Cubrir de flores</i>	Kovri per floroj
<i>Estatua de bronce</i>	Bronza statuo
<i>A partir de mañana</i>	Ekde morgaŭ
<i>La ciudad de Rosario</i>	Urbo Rosario
<i>Máquina de vapor</i>	Vapormaŝino
<i>Enfermedad del corazón</i>	Kormalsano
<i>Pasar de largo</i>	Preterpasi
<i>Dejar de lado</i>	Flankenlasi
<i>De parte mía</i>	Je mia flanko, miaflanke
<i>Acaba de partir</i>	Li ĵus foriris

TENER se traduce **teni**, pero solo en el sentido de *asir*.

Mi tenas libron en la mano – *Yo tengo (asgo) un libro en la mano.*

Mi havas multajn librojn – *Yo tengo (poseo) muchos libros.*

Y en castellano “tenemos” *que ir, que hacer* (debemos ir, hacer, etc.).

Ni devas iri, fari, ktp.

Tengo algo que hacer	Mi havas ion por fari
No tengo nada	Mi havas nenion
Tengo hambre	Mi estas malsata, mi malsatas.

HACER. Este verbo en castellano se usa para “hacer” de todo:

<i>Hace calor</i>	Estas varme
<i>Hace largo rato</i>	Antaŭ longa tempo
<i>Hace mucho</i>	Antaŭ longe
<i>Hacerse el dormido</i>	Ŝajnigi sin dormanta
<i>Hacerse de dinero</i>	Gajni, akiri monon
<i>Se hace de día</i>	Tagiĝas
<i>Se hace tarde</i>	Malfruiĝas
<i>Se hizo pedazos</i>	Disrompiĝis
<i>Esto hace bien</i>	Tio bone efikas

POR – PRO. Estas dos preposiciones no deben confundirse. **Por** indica *finalidad*: **oni ne devas vivi por manĝi, sed manĝi por vivi** – *No se debe vivir para comer, sino comer para vivir.*

Pro indica *causa, motivo de una acción*: **Pro tiu vundo li mortis** – *por (a causa de) esa herida murió.* Compare: **Li venis por tio** – *él vino para eso.* **Pri tio li venis** – *por eso vino.*

FORNO. Cuando queramos precisar a qué clase de horno u hornillo nos referimos, diremos: **bakforno** (de hornear), **kuirforno** (de cocina), **hejtforno** o **hejtilo** (estufa), **altforno** (alto horno), etc.

ALGUNAS EXPRESIONES

<i>Lo más prontoposible</i>	Kiel eble plej baldaŭ
(tiempo)	Kiel eble plej rapide
(velocidad)	Nek mi, nek li
<i>Ni yo, ni él</i>	Ĝis revido!
<i>Hasta la vista</i>	Kiel vi fartas?
<i>¿Cómo está usted?</i>	Fartu bone!
<i>¡Qué le vaya bien! (de salud)</i>	Li kredas je Dio
<i>Él cree en Dios</i>	Dank' al Dio
<i>Gracias a Dios</i>	De temp' al tempo
<i>De tanto en tanto</i>	lom post iom
<i>Poco a poco</i>	Aliflanke
<i>Por otra parte, por otro lado</i>	Oni devas manĝi por vivi
<i>Hay que (se debe) comer</i>	Pli kaj pli
<i>para vivir</i>	Ŝajnas nekredebla
<i>Cada vez más</i>	(estas) pli bone
